

# STIFTO

198

## El la enhavo:

Ŝanĝo de la asocia adreso  
Nová služba svazu  
Novjara mesaĝo de UEA  
100 jaroj de EK Brno  
Paroliga kurso + Ekzamenoj  
E-muzeo en Česká Třebová  
Informoj por UK Zagreb  
Ministeria alvoko 2001  
Orienta politiko de Vatikano 2

1  
2001

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj). **rete Starto:** starto@clavis.cz.

**www.clavis.cz/starto. rete ĈEA:**  
cea.polnický@quick.cz (sekretario)  
podhradská@volny.cz (prezidanto)  
www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokategorioj:** A 200 Kč. B 100 Kč, D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 490 Kč komencantoj, 450 Kč progresintoj. Aliĝoj:  
Jana Melichárková, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa, ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**  
3330-021/0100, Komerční banka  
Poděbrady

## Komitato de ĈEA:

**Prezidantino:** Věra Podhradská, Poříčí I, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047, podhradská@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02/9912201, fakso 02/9912126, e-mail: chrdle@kava-pech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj)

**Vicprezidanto:** Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), e-mail: repasyn@iol.cz, tel. 0338/324 287, 0602 800214

**Sekretario:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax.: 0324/615651, cea.polnický@quick.cz (kontakto, membrobazo)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj), tel. 02/879386

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na nábreží 45/25, 736 01 Havřířov, tel. 069/6815253 (EK, kulturo)

**Komitatano-ĉefdelegito de UEA:**  
Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší (protokolado, junulara sekcio)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61 Bludov

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj), starto@clavis.cz

**Lingva kontrolo:** Miloslav Pastřnák  
**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

**Abonoj de gazetoj:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada\_hasala@iol.cz

**Svazová adresa:**

**ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ  
PRAHA**

**c/o Pavel Polnický**

**Lesní 150/VI**

**290 01 Poděbrady**

**tel./fax: 0324/615651,**

**e-mail: cea.polnicky@quick.cz**

(c/o =korespondenční adresa organizace)

**Svazový účet**

**3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady**

Ačkoliv v minulém čísle byla nová adresa svazu uvedena několikrát, stále přicházejí dopisy na adresu starou, proto jsme se rozhodli novou adresu uvést tak výrazně, aby ji nebylo možno přehlédnout.

**Nové poštovní tarify**

\* **5,40 Kč** - pohlednice i dopis pohlednicového formátu do 20 g, max. rozměry 23,7 x 12,2 cm x 0,5 cm.

\* **9 Kč** - větší formát nebo váha 20 g až 50 g.

\* **14 Kč** - do 350 g.

\* **16 Kč** - do 500 g.

**Neplatí tedy zvýhodněné poštovné pro pohlednice a také za list papíru v obálce A5 se už platí 9 Kč!!!!**

**ROZESÍLÁNÍ STARTA**

**Uvítáme možnost zasílat Starto hromadně na jednu adresu, pokud je v klubu předáte adresátům.**

Poštovné za jedno Starto stojí 9,- Kč, ale 2 až 9 ks jen 14,- Kč, více čísel pak 16 Kč.

Expediční náklady se tak mohou snižovat až na 1 Kč za kus a svaz bude moci značně sumy ušetřit. Sdělte seznamy lidí, kterým je možno zaslat Starto společně.

## Internetové adresy

S mnoha funkcionáři svazu lze komunikovat také již elektronickou poštou:

### Předsedkyně Věra Podhradská:

podhradska@volny.cz

### Tajemník Pavel Polnický:

cea.polnický@quick.cz

### Místopředseda Petr Chrdle:

chrdle@kava-pech.cz

### Místopředseda Jan Řepa:

repasyn@iol.cz

### Vedoucí kontrolní skupiny Josef Hron:

josef.hron@vakpce.cz

### Vedoucí Libroserva Zdeněk Pluhař:

m.pluharova@worldonline.cz

### Zprostředkovatel předplatného časopisů Vladislav Hasala:

vlada\_hasala@iol.cz

### Vedoucí písemných kurzů a pedagogické sekce Jana Melichárková:

melicharkova@quick.cz

### Redaktor Starta Miroslav Malovec:

starto@clavis.cz

## NOVÁ SLUŽBA SVAZU

### Aktuální svazové

### informace na internetu

Po vzoru UEA, které rozesílá po internetu "Gazetaraj Komunikoj de UEA" s aktuálními informacemi z hnutí pro funkcionáře a redaktory, zamýšlí i ČES podobnou cestou informovat kroužky a členy o nejžhavějších aktualitách, aby nemuselo vše čekat až na Starto. Nepravděpodobně budou vycházet dvě řady (esperantská i pro zahraničí, česká pro začátečníky a neesperantisty). Proto žádáme členy a kroužky, kteří mají o tuto

službu zájem, aby nahlásili svou internetovou adresu místopředsedovi (chrdle@kava-pech.cz), který se zatím tohoto úkolu ujal. Jemu je také možno posílat náměty a zprávy, které byste chtěli touto cestou rozeslat.

## Další informace o autokarovém zájezdu na UK do Záhřebu:

Ubytování ve škole pro handik. děti i doprava je zajištěna, změna je v tom, že k moři nepojedeme v sobotu, ale v úterý v den celodenních výletů. Některá odpoledne během kongresu použijeme pro odpolední výlety na poznání okolí Záhřebu. Ze stravování však budou pouze snídáně ve školní jídelně - ubytovna není blízko kongreseja, ale několik teplých večeří nám poskytne řidič autobusu. Cena zájezdu nepřesáhne 7000,- Kč. V autobuse je ještě 10 volných míst. Zájemci by měli sledovat časopis AEH Informilo, v kterém budou postupně další potřebné informace. Informilo je vydáváno každý měsíc, předplatné na rok 150 Kč.

*Svaz zdravotně postižených esperantistů*

*Na Okrouhliku 953/21,*

*530 03 Pardubice*

*tel. 040/6611941*

## Skokovy printempe

23.-29.4.2001 Semajna lingva seminario en Skokovy. Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe: Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, 193 01 Mladá Boleslav, tel.: 0326/731845, e-mail: vanek@europe.com.

## PER PACA ARMILO EN NOVA JARMILO

Tiom UEA vastiĝis tra la mondo, ke la tradicia novjara mesaĝo devus esti sendita plurajn fojojn tra la jaro. Multaj el niaj membroj festas la novan jaron nun, sed ekzistas ankaŭ multaj, kiuj festos ĝin post kelkaj tagoj; aliaj, kiuj festos ĝin en marto aŭ septembro; aliaj, kiuj nun festas ne la novan jaron, sed Ramadanon; kaj certe eĉ aliaj. Ĉiukaze, pro respekto al la tradicio, ni restu ĉe la komenco de la kristana kalendaro.

Novjara mesaĝo estas okazo por pritaksi kun kritika distanco la evoluon dum la pasinta jaro kaj por esprimi dezirojn pri la evoluo en la posta jaro.

La Esperanto-movado dum la jaro 2000 daŭrigis sian kutiman kreskon. Ne lasu, ke misgvidu vin la membro-nombro de ĉi tiu aŭ de aliaj organizaĵoj. En efektiveco, ĉi-momente Esperanto kreskas. foje eĉ tumulte, en regionoj, kiuj ne eniras la bonkondutan cirklon de la ok plej industriaj landoj en la mondo. Ekster tiuj ok landoj esperantistoj apenaŭ povas revii pagi kotizojn aŭ aĉeti librojn eldonatajn en tradicie fortaj bazoj de la movado. Defio staras antaŭ UEA kaj la ceteraj organizaĵoj: ĉu ni sukcesos trovi manierojn enplekti tiujn homojn en la vivon de Esperantujo? Nia himno nenie asertas, ke ĉi flugiloj de facila vento devas porti la novan senton nur de riĉa loko al riĉa loko.

Se vi do vivas en lando, kie ne estas problemoj pagi la kotizon de individua membro, bonvolu fari tion. Per tio vi helpas ĉiujn agadojn de UEA (ekde disvastigo de Esperanto inter la junularo

aŭ en la Interreta mondo ĝis helpo al la movado en Afriko aŭ Nepalo). Jen kiel, fakte, oni elspozos la monon de via kotizo. Krome, vi aliĝos al la rondo de la esperantistoj plej bone informataj per la plej legata Esperanto-revuo, kaj vi estos inter la plej favorataj partoprenantoj de Universalaj Kongresoj, aĉetantoj de libroj kun rabatoj ktp.

Estas nun finiĝanta Kampanjo 2000, kiun sindediĉe sekvis la esperantistaro en multaj landoj. Ĝi portis kelkajn sukcesojn, dum ĉe iuj agad-flankoj progreso forestas. UEA, kiel reprezentanto de la monda esperantistaro, regajnis ĉiujn ŝanceliĝintajn poziciojn ĉe internaciaj organizaĵoj, kiel UN kaj Unesco kaj aliaj ankoraŭ, kaj ĝuste en la dua duono de la jaro 2000 atingis pliajn rezultojn. Esperantistoj estis petataj prelegi en Unesko mem al la tuta mondo de neregistaraj organizaĵoj. Neniu ridetis kaj neniu primokis, multaj eĉ petis rilati kun ni. Same okazas en UN, kie, dank' al la refortigita Novjorka Oficejo, oni komencas ricevi de pluraj flankoj subtenojn por la rezolucio de la Seula konferenco de NRO-j (1999), kiu postulas, ke UN finfine alfrontu la problemon de lingvaj homaj rajtoj kaj la eblan solvon pere de neŭtrala lingvo.

En ĉiuj kontinentoj esperantistoj komencas funkciigi ĉiam pli sukcese siajn kontinentajn aŭ landarajn E-asociojn, -uniojn kaj -komisionojn. Mi ne povas ne menciigi la amerikajn kaj aziajn kongresojn, kiel brilajn ekzemplojn de tio, kion oni faras. Mi ne povas ne menciigi la revigliĝon de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu

eble siavice revigligos kelkajn E-agade marĝenajn eŭropajn landojn. Mi certas, ke eŭropaj esperantistoj kapablos ĝis maksimumo ekspluati la eblojn, kiujn prezentas la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001, por montri al la mondo, kiu vere volas subteni plurlingvecon kaj sekurigi la pluekziston de naciaj lingvoj.

Apud la tradiciaj rimedoj por E-agado pli kaj pli ekspansias io nova: Interreto. Estas vere mirinde konstati, kiel rapide esperantistoj sukcesis adaptiĝi al ĉi tiu moderna komunik-rimedo kaj utiligi ĝin por Esperanto. Tiu kampo certe prezentas al ni multajn eblojn (mi ne kaŝu de vi, ke multaj novaj esperantistoj en multaj malnovaj landoj varbiĝas pere de interretaj kursoj). UEA kaj la ceteraj organizaĵoj devus, laŭ mi, iom pli kuraĝe plonĝi en ĉi tiun maregon, kie oni trovas amason da junaj kaj interesaj homoj. Ĝuste tiajn homojn ni bezonas.

Ĉar ni parolas pri junaj homoj, estas oportune menciigi la labor-streĉojn de nia junulara sekcio TEJO, kiu rekomencas produkti novajn ideojn kaj novajn sukcesajn agadojn. Mi apelacias al ĉiuj legantoj de ĉi tiu mesaĝo, junaj kaj maljunaj, ke ili klopodu superi organizaĵajn kaj aĝajn limojn kaj antaŭenigi kunlaboron. Ĉiu plia novjara mesaĝo fakte portas nin pli proksimen al la momento, kiam la TEJO-homoj devos transpreni la torĉon (kaj mem verki siajn novjarajn mesaĝojn). Same mi petas ĉies kunlaboron por ILEI, nia instruista brako. Apenaŭ necesas diri, ke kie oni ne instruas Esperanton, oni ne kreas

esperantistojn. Instruado havas fortan lokon en la nun diskutata nova laborplano de UEA.

Mi ne povas fini ĉi tiun mesaĝon sen du lastaj konsideroj.

Niaj fakaj asocioj devas fortiĝi, por apliki Esperanton en la praktiko. Nur kiam Esperanto estos lingvo, per kiu oni povas aĉeti kamionon en Eŭropo kaj sendi ĝin al Afriko, tiam Esperanto komencos esti vere normale internacia lingvo.

Mi parolis pri kamionoj kaj komercado, sed ne estas malsame pri spiritaĵoj kaj kulturaj varoj. Kiel ĉiam okazis en la pasinteco, ekzistas fortoj en la mondo, kiuj postulas rezigni je demokratio favore al ekonomia efikeco. Ne estas strange, ke tiujn ideojn subtenas ĉefe tiuj, kiuj estas (aŭ esperas esti) ekonomie fortaj. Ni apartenas, laŭ mi, al la alia flanko, al tiuj, kiuj postulas, ke la homo estu en la centro de la atento, kiuj pensas, ke ekonomia evoluo havas sencon nur, se ĝi plifeliĉigas, ne se ĝi mortigas la homon per malsanoj aŭ detruante lian mondon. Ni postulas, ke ankaŭ en la lingva kaj kultura kampo estu demokratio, ke neniu humiliĝu kaj submetiĝu. Tion ni diru laŭte kaj klare en ĉiuj forumoj, en kiuj ni havos la eblon paroli dum la venonta jaro. Interne de la movado, ĉiuj bonvolu partopreni la diskutojn pri la labor-plano, kies slogana resumo estas ĝuste: Al lingva demokratio!

Bondezirojn al vi kaj al Esperanto en la jaro 2001-a.

*Kep Enderby*

## **Ekspozicio en Vyškov**

Esperanto-rondeto en Vyškov preparas okaze de la unua Semajno de internacia amikeco en tria jarmilo ekspozicion **ESPERANTO kaj SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO** en Sokolský dům, Tyršova 2 en la tagoj de la 26-a de februaro ĝis la 2-a de marto. Inaŭguro de ekspozicio okazos la 26-an de februaro en la 16-a horo. Por montri, kiel estas akireblaj kontaktoj pere de Esperanto, oni volas ekspozicii ankaŭ salutojn, ricevitajn okaze de Semajno de internacia amikeco. Por ebligi kaj subteni tion estas petataj esperantistoj el la tuta mondo sendi salutojn al la E-rondeto en Vyškov. Ili estu aŭ en formo de bildkarto sendita al la adreso: Esperanto-rondeto, MKS (Urba Kulturcentro), J. Šoupala 4, CZ-682 01 Vyškov, Ĉeĥio aŭ kiel retmesaĝo al la adreso:

vojacek@jumbo.ped.muni.cz.

Ĉiu sendinto ricevos samforman respondon. Financan subtenon por agado de E-rondeto, precipe por abono de gazetoj, ricevis Urba Kulturcentro (MKS) en Vyškov de PharmDr. Marie Lužová en sumo 1500,- Kč. Koran dankon al donacintino.

## **Esperanto-Silvestro en Ĉeská Třebová**

La 29-an de decembro 2000 festis gesamideanoj en Ĉeská Třebová Esperanto-Silvestron kun siaj geamikoj. Kunvenis ĉirkaŭ 80 personoj el tuta Ĉeĥio, eĉ Gerry el Nederlando kaj Brian el Ameriko. La temo de vespero estis:

"En nova jarmilo ni komencos en unua klaso."

En unua parto de vespero estis lotumita unu el gesamideanoj, kiuj sendis salutojn al la 40-a datreveno de E-rondeto. Estis ellotumita franca familio. Unu el ĝi gajnis senpagan unusemajnan restadon en Česká Třebová.

En dua parto de Silvestra vespero prezentis sin klasoj aŭ unuopaj gelernantoj. Premion gajnis inter gelernantoj Kvido Janík el Šumperk, inter klasoj E-mentál el Praha. Ĉeestantoj ne nur dancis, sed ankaŭ lernis en paŭzoj inter danco. Ankaŭ aŭskultis novaĵojn el jaro 2000. Dum noktomezo disaŭdiaŭis malnova E-jaro 2000 kaj alvenis nova 2001. Sub arbedo estis por ĉiu donaceto.

## **PAROLIGA KURSO + ASOCIAJ EKZAMENOJ**

Kurs pro začátečnsky, kteří se chtějí rozmluvit v esperantu, společně s obnovenými svazovými zkouškami pro pokročilé, kteří už mluvit dovedou, se připravuje v České Třebové na dny 8.-10.6.2001. Prosincový kurs se dvěma třídami byl velmi úspěšný, proto chceme pokračovat dvakrát do roka.

Svazové zkoušky existují **pri scio a pri kapablo instrui** (napřed musíte mít první, abyste se mohli přihlásit do vyšší). Nižší zkouška má ukázat, že esperanto umíte, vyšší zkouška má prokázat, že jste se seznámili s pedagogickým minimem a jste schopni opravit a vysvětlit chyby. Přihlášky: Jana Melichárková, 696 02 Ratíškovice.

## Sto let esperanta v Brně

V sobotu **26. května 2001** oslaví Klub esperantistů v Brně 100. výročí svého založení, protože se považuje za pokračovatele Prvního spolku esperantistů rakouských, který byl v Brně založen v roce 1901 jako první oficiálně uznáný esperantský spolek v tehdejší rakouské monarchii. Záštitu nad setkáním esperantistů, které se uskuteční v reprezentačních saloncích Staré radnice, přijal primátor města Brna RNDr. Petr Duchoň. K výročí jsme již vydali pohlednici, připravujeme výstavku a počítáme s kulturně přednáškovým programem, který nejen připomene stoletou minulost, ale zamyslí se i nad současností a budoucností esperanta, zvláště v souvislosti s letošním Rokem jazyků, který vyhlásila Evropská unie s Radou Evropy.

Srdečně zveme esperantisty z celé republiky na oslavu našeho výročí, které je vlastně i výročím celosvazovým, vždyť jde o první oficiální esperantskou organizaci na našem území. Zájemce o účast prosíme, aby nám do 15. 5. 2001 napsali - potřebujeme mít představu, koho budeme moci uvítat, zvláště pak ty, kteří budou chtít zajistit oběd, případně i nocleh. Účastnický poplatek **50 Kč** se platí na místě.

Pište na adresu: Klub esperantistů v Brně, p/a Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10. 625 00 Brno, případně telefonicky 05/4724 0690 nebo e-mailem starto@clavis.cz

V programu budou přednášky, koncert, návštěva kulturních památek Brna a výstava ke 100-leté činnosti klubu.

## POLIČKA

Jam preskaŭ tridek jarojn praktikis sep Esperantaj rondetoj el Žamberk, Litomyšl, Česká Třebová, Šumperk, Svitavy, Lanškroun kaj Polička unufoje jare organizi komunajn sabatajn renkontiĝojn kun riĉa programo. Pli poste ĉesigis tion gesamideanoj el Litomyšl kaj Žamberk.

Ĉijare oni planas renkontiĝon en marto en Lanškroun, la 26-an de majo en Polička, en septembro en Svitavy kaj oktobre en Česká Třebová.

### INVITILO

La esperanta rondeto en Polička vin invitas por komuna renkontiĝo, kiun okazos sabate la **26-an de majo 2001**.

Kunveno je la 10-a horo antaŭ la stacidomo.

La programo:

10.15 - 11.00 Trarigardo de la entrepreno "PONAS"

11.15 - 12.00 Vizito de la nederlanda muzeo en Lezník

12.15 - 13.00 Tagmanĝo kaj la posttagmeza programo okazos en la unua etaĝo de la hotelo Lichták situanta kontraŭ preĝejo

13.00 - 14.15 Raporto pri vizito de la insulo Mauritius (Josef Joneš)

14.15-15.00 Tomboło

15.00 - 15.30 Informoj el la Esperantaj rondetoj, preparo por viziti E-konferencon en Strážnice

15.30 - 16.00 "Pri la sana manĝado" (Ing. Štefek)

Post la 16-a horo libera babilado

Invitas

*Ing. Blahoslav Štefek  
prezidanto  
de la Esperanta rondeto  
en Polička*





## Esperanto kaj turismo.

UNO komune kun UNESCO deklaris la jaron 2002 "Jaro de ekoturismo". Eksciante pri tio, mi ekrememoris pri iama turisma sekcio de ĈEA, kiu jam multajn jarojn bedaŭrinde ne plu ekzistas. Tio tamen ne signifas, ke niaj esperantistoj ne okupiĝas pri turismo, kaj precipe pri la ekoturismo (alinome "mola turismo", do turismo, kiu ne difektas la naturon). Certe ne apartenas al ĝi aŭtomobilismo, sed jes ja piedmarŝado, biciklado, skipilgrimado kaj laŭrivera kanuado (rafting).

Ja estas niaj kluboj, kiuj organizas tradicie la piedturismajn aranĝojn, mi nomu almenaŭ tiujn, kiujn mi mem gustumis kaj ekŝatis, do printempan Adonidon fare de EK Ratíškovice aŭ aŭtunan Naturamikan renkontiĝon fare de EK Jablonec. Dum IFEF-skisemajno en Dlouhé Stráně en 1996 estis ankaŭ pluraj skiantoj, kiuj montris intereson denove komune skii, krome mi scias (kvankam mi mem neniam partoprenis), ke nia iama junularo (nun jam plejparte mezaĝuloj) tradicie ĉiujare komune skias dum "alciono" (ledňáček), lastan fojon pasintmonate en Jizerské-montaro.

Al tiuj aktivadoj ĉijare aldoniĝas internacia biciklista renkontiĝo en Doksy IBIRE (rig. Starton 5-6/2000), antaŭ kiu estas (pro intereso de eksterlandanoj) algluita antaŭa biciklista renkontiĝo rande de Prago (en Dobřichovice).

Mi spertis, ke tiuj, kiuj interesiĝas pri "malaŭtomobilisma" turismo, relative multnombros, kio scivoligis min, kiom

granda estas tiu subaro de la ĉeĥaj esperantistoj, por povi ekkoni ilin kaj eble eĉ enketi kaj iom strebi kunordigi estonte niajn aktivadojn (mi ja konfesas, ke ankaŭ mi apartenas al tiu specio da strangaj estaĵoj, kiuj volonte moviĝas en naturo senmotore, ĉu piede, ĉu surbicycle, ĉu skiante). Ne estas mia celo refondi turisman sekcion de ĈEA kaj fari novan organizan strukturon, kvankam se estos intereso, mi ne kontraŭus tian ideon. Laŭ mi pli gravas simple scii pri si reciproke por povi pli efike plani turismajn aranĝojn kaj konsideri dume la dezirojn de la ceteraj. Se ni sekve sentos bezonon organiziĝi aŭ ne, estas ja nur duaranga afero.

Mi do finas per iuspeca alvoko: se vi pretas (aŭ eĉ ŝatas) mem porti sian dorsosakon kaj movi sin almenaŭ pli ol 10 km per ajna maniero sen motorhava veturigilo kaj interesiĝas pri komunaj turismaj Esperanto-aranĝoj, bv. sendi ajn-forman interessignon kun via adreso (se vi posedas, do ankaŭ retadreson) al mi: Petro Chrdle, Anglická 878, 25229 Dobřichovice, tel.: 02/9912201, fakso: 02/9912126, rete: chrdle@kava-pech.cz (Vidu Starto 5-6/2000, p. 26)



## MIA VETURO EN HUNGARIO

Fine de novembro mi veturis por mallonga vojaĝo al Hungario. Tiu ĉi lando famas por ni la plej multe per vino, kolbasetoj kaj per la lago Balatono. Győr estas historia urbo lokita ĉe konfluo de la riveroj Raba kaj Danubo sur trafikŝoseo de slovaka-hungara limo al Budapeŝto.

Dum alveno en urbon estis problemetoj atingi hotelon. Ununura strato gvidanta al hotelo estis indikita kiel malpermesita kun trafika signo kaj ankoraŭ kun ia neklara por mi surskribo. Loka almozpetanto tamen klarigis al mi per miksaĵo de ĉeĥa, slovaka, germana, angla kaj hungara lingvoj, ke la malpermeso ne validas por hotelaj gastoj. Kun meritita germana monero la almozpetanto malaperis tuj certe en proksiman gastejon.

Post la loĝiĝo mi interkonsentis renkontiĝon kun loka esperantisto, sed bedaŭrinde la renkontiĝo ne sukcesis realiĝi. Do, mi ekmarŝis sole urben armita per vortaro. Ĝin mi ne multe uzis, servis al mi la germana. Rilatoj hungaraj kaj germanaj estis konataj, oni ne povas miri. Mi enketis, ĉu hungaroj scias pri Esperanto. Iuj sciis, aliaj ne, sed ili povus scii, ĉar unu el la ĉefaj stratoj en la urbo, ĉe la stacidomo, nomiĝas Esperanto.

Hungarion mi vizitis unuafoje, do, prefere mi interesiĝis pri vino kaj kolbasetoj. Tion mi ĝuis dum vespero kun kolegoj en gastejo proksime de teatro. Sur la teatro mi rigardis grandan katenan afiŝon kun la vorto SVEJK. Mia

konjekto pri ĉeĥa soldato Ŝvejk certigis post alparolo de teatra laboranto. Mi fiere deklaris min ĉeĥo.

La lastan tagon mi vizitis informojn. Ĉi tie dediĉis al mi sian atenton la ĉefo. Per flua germana li klarigis al mi, kie mi povus agrable pasi restantajn tagojn. La elekto estis vere riĉa. Pri la lingvo Esperanto li sciis, sed li ne kapablis konsili al mi, kiel ligi kontakton.



Ĉie, kie mi gapis, mi vidis surskribojn PANNON. Temas pri mallongigo de la vorto PANNONIA - historia teritorio de Hungario.

Dum tri tagoj mi multe vidis kaj ekkonis. En librovendejoj mi trovis librojn de ĉeĥaj aŭtoroj, tra urbo veturis famaj "Ikarusoj"... Miaj kolegoj kun plezuro klarigis al mi ĉion, pri kio mi demandis, kaj mi reciproke mirigis ilin per mia "kono" de hungaraj vortoj.

Tio ĉio kaŭzis, ke mi intencas mian unuan libertempon en tria jarmilo pasi ĉi tie en Hungario.

Viszontlátásra, Győr !

*Januaro 2001 - Míra Vaněk,  
kunlabore Jindřiška Drahotová*

## JAZAF 2000 en Leipzig

Komence de decembro 2000 okazis en Leipzig (FRG) seminario JAZAF (Jarfina kaj Zamenhofa Festo). La seminarion regule okazigas RSEA (Regiona Saksa E-asocio) alterne ĉiun jaron en unu el jenaj kvar urboj: Leipzig, Chemnitz, Dresden kaj Pirna. Kutime partoprenadas ĉk. 30 geesperantistoj el diversaj lokoj de Germanio, sed ankaŭ eĉ kelke da eksterlandanoj. Precipe estas persone invitataj tiuj, kiuj kapablas aktive kontribui seminarian programon. De la lastaj jaroj mi ŝatus rememori prof-ron Formizzi el Verona (I), ges-rojn Kaminski kaj Kemblovska el Lodz (PL). Jam ekde 1995 aktive partoprenadas ankaŭ ĉeĥaj gesamideanoj, ekz. s-ro L. Rýznar el Svitavy, geklubanoj el Ústí n. L. kaj aliaj. Pasintjara JAZAF okazis sub la slogano "Eŭropo - granda komunumo". La programo estis tre varia. Prelegoj temis ekz. pri kalendaroj kaj tempo en Eŭropo (d-ro H. Werner), Eskulapkolubro - la besto de la jaro 2000 (d-rino Barenz), la lingvoproblemo en Eŭropo kaj eblaj ŝancoj por Esperanto (d-ro Blanke), Esperanto kaj tradukado (d-rino Fiedler), la signifo de vortaroj (prof. Krause), la salmoj en Elbo (N. Karbe) kaj lumigo de laborlokoj (d-ro Nitzsche). Pokalon, kiel premion por la plej bona amatora prelego gajnis Ing. Josef Kříž el Ústí n. L. por sia prelego je aktuala temo "Elbo - nia ligilo en Eŭropon".

Trihora gvidita rondveturo tra la urbo Leipzig bonege montris historian centron de la urbo kaj la atingaĵojn dum la pasintaj dek jaroj kaj ankaŭ tion, kio

ankoraŭ farendas. Gesamideanoj de la E-klubo Leipzig meritas absolutorion por perfekta organizado de la tuta aranĝo.

-ijk-

### Nia filmo

1. La prezidanto plantas Esperanto-arbon en Znojmo dum la oktobra konferenco
2. Lotumado dum Esperanta Silvestro en Česká Třebová (vidu p. 7)
3. Ing. Kříž kun sia pokalo akirita dum JAZAF 2000 en Leipzig



## Zpráva o činnosti Městského muzea v České Třebové odd. "Historie esperantského hnutí v Českých zemích" za rok 2000

Prvořadým úkolem esperantského oddělení Městského muzea (dále jen muzea) bylo soustředování informací o činnosti jednotlivých esperantských klubů tj. setkáních, výuce, přednáškové činnosti. Nejvíce informací je z klubů v Havířově a České Třebové. Je škoda, že o činnosti mnohých klubů nikdo za několik let nebude vědět.

Dary do muzea jsou velmi různé: knihy, časopisy, písemné práce, včetně odborných (od sam. Středy z Úpice, pozůstalostí atd.) i poezie (sam. Urbanová, sam. Ludíková). Nově vydané knihy v esperantu darovala do muzea agentura KAVA-PECH (Dr. Chrdle). Ještě za svého života daroval do muzea svoje rozsáhlé dílo básník Jiří Karen a do muzea přešla téměř celá pozůstalost básníka J. Rumla. Velkou sbírku esperantských knih darovala muzeu Sonja Zedníková z Prahy a esperantský klub ze Šumperka. Pro větší sbírky jsme si přijeli, ale další knihy jsme dostávali poštou i z ciziny nebo osobním předáním. Díky obětavým esperantistům máme v muzeu esperantské mince (Stelobj), odznaky, nálepky i samolepky, pohledy i poštovní esperantské známky.

Do podzimních měsíců se pracovalo v depozitáři (vlastní výstavní prostory

dosud nemáme) ve všeobecně svízelných prostorových podmínkách. Zlepšení nastalo rozšířením depozitáře o 5 místností. Z toho v jedné z větších je umístěna knihovna esperantských knih a časopisů. V části další místnosti se soustředí duplicitní časopisy a písemnosti z jednotlivých klubů.

Celkem je v esperantské knihovně 6310 sbírkových knih po jednom výtisku, výjimečně ve dvou exemplářích. Navíc tzv. duplicitních knih a brožur je 4037 kusů, z toho je některých pět i více stejného titulu. Sbírkové knihy jsou zpracovány na počítači a rozděleny do 16 skupin. Pro přehled je uveden zjednodušený seznam.

1. Učebnice; 2. Slovník; 3. Průvodce; 4. Próza; 5. Poezie; 6. Kongresy; 7. Divadelní hry; 8. Svázané časopisy; 9. Zpěvníky; 10. O esperantu; 11. Vědecké (odborné); 12. Náboženství; 13. Životopisy; 14. Adresáře; 15. Politické; 16. Ostatní.

Do roku vydání 1900 je v knihovně více než 10 knih z toho i jedna učebnice od L. L. Zamenhova. Množství knih je z počátku esperantského hnutí vydaných v Čechách a na Moravě po roce 1900.

Náročná práce s uspořádáním knihovny téměř skončila. Zbývá dopsat na počítači seznam duplicitních knih a brožur. Část esperantských časopisů je roztríděna, ale stovky dalších čekají na roztrídění. Stále chybí ochotní esperantisté, jako je např. Ing. VI. Kočvara z Opavy, který nelituje dlouhé cesty vlakem a v muzeu již odpracoval desítky hodin.

Dosud máme na prodej 5 druhů pohlednic na rubu s esperantským textem

(nejdříve esperantem, potom německy a anglicky), dále vánoční pohlednici s nápisem na čelní straně "Kristnaskan saluton" a 2 pohlednice České Třebové a okolí s nápisem "Saluton el Česká Třebová".

V první polovině letošního roku chceme vydat pohlednici s esperantským textem propagující esperantské oddělení českotřebovského muzea. Dále rozšířit sbírku esperantských nálepek (samolepek a různých esperantských odznaků včetně kongresových). Založit sbírku pohlednic s esperantským textem (pokud možno z celého světa) včetně obálek a korespondenčních lístků. Věřím, že do těchto tématických sbírek přispějí esperantisté právě tak, jako zaslali a zasílají do muzea knihy a časopisy.

V České Třebové 29. 1. 2001

Jiří Pištor  
správce muzea

## Esperanto-muzeo en Česká Třebová

La muzeo kolektas informojn pri agado de kluboj, akceptas donacojn, precipe librojn kaj manuskriptojn. La biblioteko posedas 6310 librojn ordigitajn jene: 1. Lernolibroj, 2. Vortaroj, 3. Gvidlibroj, 4. Prozaĵoj, 5. Poeziaĵoj, 6. Kongresoj, 7. Teatraĵoj, 8. Bindaĵoj, 9. Kantaretoj, 10. Pri Esperanto, 11. Sciencaj (fakaj), 12. Religio, 13. Biografioj, 14. Adresaroj, 15. Politikaĵoj, 16. Ceteraj. Ankoraŭ necesas enkomputiligi duoblaĵojn. La muzeo preparas bildkarton kun Esperanto-fako.

## Abonoj de gazetoj

Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, elektronika pošto:

vlada\_hasala@iol.cz

*Amikeca Reto (FR, 105 Kč), Esperantisto Slovaka (SK, 200), Eventoj (HU, 668), Eventoj, elektronika versio (429), Heroldo (CĤ, 540), Informilo de AEH (CZ, 150), Interligilo de IPETA (BG, 120), Inter ni (Malagasa R., 671), Juna Amiko (HU, 140), Komencanto (RU, 409), Kosmos (DK, 204), La Domo (FR, 392), La Gazeto (FR, 450), La Kancerkliniko (FR, 443), La merkato de IKEF (BE, 376), La Migranto (NL, 105), La Ondo de Esperanto (RU, 616), La Verda Lupeo de ELF (DE, 392), Literatura Foiro (CH, 505), Litova Stelo (LT, 407), Monato (BE, 632), La Jaro (BE, 164), Monda Solidareco (FR, 171), Ondo da Vero (TG, 555), Oomoto (JP, 250), OSIEK (135), Penseo (CN, libervola), RET-Info (HU, 429), Scienco kaj Kulturo (RU, 455), Sennaciulo de SAT (FR, 580), Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz (BR, 1133).*

## Žádost

S ohledem na tu skutečnost, že na příslušný účet "Předplatné zahraničních E. časopisů" stále i přes řadu mých již i publikovaných žádostí a proseb přicházejí neidentifikovatelné platby, obracím se znovu na předplatitele, aby ve svém vlastním zájmu věnovali tomuto problému zvýšenou pozornost. Např. 18/12/2000 přišla částka 642,- Kč s poznámkou "Monato 01", ale od koho? Totéž platí o částkách 771,- a 540,- Kč od "klub esperantistů", ale který?, datum 23/01/2001. Na základě shora uvedeného pak bohužel příslušná periodika apod. nemohu objednat.

Vl. Hasala

## **Jarraporto pri aktivado de Esperantista Klubo de J. Kořínek en Ústí n. L. en la jaro 2000**

La klubo konsistis el jenaj membroj: Ges-anoj 1. Hilda Kořínková, 2. Václav Vanc-patro, 3. Věra Novobilská, 4. Vlastimil Novobilský, 5. Eli Böhmová, 6. Marie Moučková, 7. Miluše Krejčová, 8. Josef Kříž, 9. Pavel Páral, 10. Václav Vanc-filo, 11. Miroslav Smyčka. Regulaj gastoj: Jiří Laube (Roudnice), Oldřich Antoš kun edzino kaj filo (Děčín), Jiří Rada (Most).

**Klubaj kunvenoj ĉiumonataj:** kutime la lastan jaŭdon je la 15,30 h. en sakristio de dominikana monaĥejo, Hradiště 4 en Ústí n. L.

**Tradiciaj aranĝoj,** anoncitaj en E-revuoj kaj bultenoj en la j. 2000: 13-a Internacia Kultura Festivalo (29.9.-1.10.2000), 18-a Ĉeĥa-Saksa tago kun Zamenhof-omaĝo kaj adventa vigilio (8.-10.12.2000).

**Kluba komitato:** M. Smyčka (prezid.), VI. Novobilský (vicprez.), M. Moučková (kasistino), M. Krejčová (kronikistino), V. Vanc-patro (video-arĥivisto), V. Novobilská (revizoro de kontoj).

**Unuopaj aranĝoj, kiujn partoprenis niaj membroj:**

7.-8.4.: Česká Třebová - 40-jariĝo de E-klubo ... Smyčka (kant. + deklam.)

11.5.: Prago - Postmorta prezentado de la poemkolekto "Ekspedicioj de Donkiĥoto en la profundaĵoj de homa animo" far J. Karen

19.5.: Děčín - Vizito de dana esperantistino K. Vincze (enkadre de dana ĥoruso) ... ambaŭ M. Smyčka

2.-4.6.: Plavy - Naturamika renkontiĝo - Moučková, Krejčová, Smyčka

22.-29.7.: Forheim (FRG) - Kříž (internacia renkontiĝo)

6.-10.8.: Janské Lázně - KELI-konferenco (koncerto spirita kaj distra) - Smyčka

11.-13.8.: Lančov - Renkontiĝo de iamaj SER-partoprenantoj - Smyčka

18.-20.8.: Žilina - ĉeĥa-slovaka IKUE renkontiĝo - Smyčka (kantado)

13.-23.8.: Nekvasovy - E-tendaro - Moučková, Krejčová (kun nepinoj)

16. 9.: Pardubice - 13-a E-tago - Smyčka

29.9.-1.10.: Ústí n.L. - 13-a Internacia Kultura Festivalo (50 partopr.)

6.10.: Olomouc - Simfonio n-ro 1 "Esperanta" far David Gaines - Smyčka

13.-15.10.: Asocia konferenco en Znojmo, kluba reprezentanto: J. Rada

24.10. Skokovy: Enkadre de la AEH-asocia konferenco - Smyčka (kant. + deklam.)

1.-3. 12.: Lepsiko - JAYAF - Kříž (pokalo por venko en prelegkonkurso)

8.-10.12.: 18-a ĈESAT (kun omaĝo kaj adventa vigilio) (34 partopr.)

Niaj tradiciaj aranĝoj en 2001 estas okazontaj en jenaj tagoj:

La 19-a ĈESAT okazos - certe kun nia partopreno - la 19-an de junio 2001 en la germana Pirna

La 14-a Internacia Kultura Festivalo - 21.-23.9.2001

La 20-a ĈESAT (kun Z-omaĝo kaj adventa vigilio) la 8-an de decembro 2001

## 18-a Ĉeĥa-Saksa tago (kun Zamenhofa festo kaj vigilio ĉe Kristarbo) Ústí n.L. (9.12.2000)

Ĝi komenciĝis per societa antaŭ-vespero, vendrede la 8-an de dec. je la 18-a horo en la saloneto de la hotelo "Palace". - Oni babilis, kantis akompane per la gitaro de s-ano Rusín el Teplice.

La sabata programo okazis en la bela, kastelaspekta salono de la Urba Muzeo en Ústí n. L. - Dum la prelegmatineo s-ano Novobilský prezentis rememoron al s-ano Jos. Vondroušek (kiu forpasis antaŭ 5 jaroj) senditan de s-ano M. Malovec (kun specimenoj el "Apokrifoj" fare de Věra Novobilská). Simile M. Malovec pere de V. Novobilský rememoris pri R. Hromada, kiu naskiĝis antaŭ 110 jaroj (lian esperantigon de Maryčka Magdonová de Bezruč recitis Věra Novobilská). - Rememoron pri L. L. Zamenhof prezentis s-ano Novobilský kun specimenoj el Hamlet kaj La Vojo (fare de M. Smyčka). - La vivskizon de pola verkisto kaj E-poeto, samjare mortinta, Kazimierz Ścurek kaj ties du poemojn deklamis s-anoj Novobilský, resp. Smyčka. - Pri la vivo de G. Casanova en Bohemio prelegis s-ano Jar. Mráz. - Pri siaj vivspertoj kaj E-agadoj rakontis la 89-jara s-ano Bohuslav Kumpošt el Hradec Králové kaj la 87-jara honora prezidanto de nia klubo Joachim Giessner el Herzberg am Harz en FGR, kies decembran naskiĝdatrevenon oni celebris per aparta gratulo kun donaceto. Tre freŝe kaj

instige efikis la kvazaŭ senprepara prelego de juna s-ano Bohumil Bouzek el Ústí n.L., vivanta nun plejparte en Prago, pri liaj eldon-aktivecoj, sub la titolo "Kiel fari grandajn saltojn kun malplenaj poŝoj". Post la komuna tagmanĝo en la hotelo "Palace" oni vizitis ekspozicion de "betlehemoj" en la preĝejo de s-ta Adalberto, ekspoziciojn en la Urba Muzeo kaj trarigardis Urban Teatron.

En la vespera bunta koncerto prezentis kantojn kaj ariojn Kateřina Kudlíková el Prago kaj membroj de Urba Operejo en Ústí n. L. Denisa Tarantová, Andrea Dašková, elstara rusa basulo Aleksander Proklov kun eksmembro Miroslav Smyčka, kiu plie deklamis la melodramon de Zdenko Fibich laŭ la poemo "Kristnaska tago" de K. J. Erben. La tutan koncerton pianakompanis Ústí-a eksoperestro Václav Urban (inkluz. de sia filo, 10-jara Vojta Urban, kiu ludis violonĉelon). Enkadre de la koncerto rememoris Hieronymus Stroinski el Lepsiko pri elstara E-poeto kaj tradukisto Karl Vanselow. (M. Smyčka prezentis ties e-igon de la fama Lulkanto de Johannes Brahms.) - Post la koncerta programo okazis bunta tombolo, kiu fermis la tutan vesperan programon.

Dimanĉe matene en nia klubejo aŭskultis niaj germanaj gastoj kaj tri niaj geklubanoj sonkasedojn kun la paroladoj de Josef Vondroušek pri diversaj temoj.

La tutan ĈESAT-aranĝon partoprenis 34 s-anoj (nur unu el Saksio, 5 el aliaj germanaj landoj + 1 slovakino).

*Miroslav Smyčka*

## IRDEN Plavy (1.-3.6.2001)

Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj akceptas aliĝojn ĝis fino de aprilo je adreso: Max Hillebrand, Budovatelů 18, 466 01 Jablonec nad Nisou. Tranoktado en turisma tranoktejo apud la haltejo Plavy (fervoja linio 036 Liberec - Tanvald - Železný Brod). Alveno de la partoprenantoj vendrede dum la tuta tago. Posttagmeze ebla ekskurso al Příchovice (rigarduro Stěpánka) apud Tanvald. Sabate laŭ vetero ekskurso tra la valo de Jizera al Semily (Pado de Rieger). Dimanĉe ebla antaŭtagmeze promeno tra la valo de Kamenice, parto de pado Palacký (Spálov ČD - Jesenný ČD). Partoprenkostoj kaj kosto de tranoktado estas por unu persono kaj unu nokto 100 kronoj.

Esperanto-asocio "Saksa Svisio" r.a. invitas vin al

## Klerigaj kaj turistikaj tagoj

okazontaj de la 10-a ĝis la 14-a de oktobro 2001 en Jetřichovice, Ĉeĥa Respubliko. En hotelo "Bellevue" okazos kvar tranoktoj kun matenmanĝoj, tagmanĝoj kaj vespermanĝoj. Merkrede vespere parolado de la prezidanto (s-ro N. Karbe), jaŭde turistika tago (gvidas D-ro H. Hoffmann), vendrede ĝis dimanĉe klerigaj tagoj kun dancebleco sabate. Partoprenkotizo 160 GM, por ekssocialismaj landoj 120 GM. Aliĝojn akceptas s-ro Norbert Karbe, Dr.-Otto-Nuschke-Str. 12, DE-01796 Pirna, Germanio, tel/fax: 03501 773232, retpoŝto: nokosaksio@t-online.de.

## Ekumenický Esperanto-kongres v Záhřebu

(14.-22.7.2001)

Odjezd s účastníky 13.7., návrat 22.7. Informace a přihlášky: Katolická sekce ČES, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice, msvacek@iol.cz.



## La Internacia Junulara Kongreso de TEJO

okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2001 en Strasburgo, Francio. Temo de la renkonto: "Plurlingvismo en Eŭropo: kiel ĝin sukcesigi?" Programo: arta kaj lingva festivalo, prelegoj kaj diskutoj pri multlingveco, malkovrado de diversaj lingvoj, ekskursoj, koncertoj, ludoj kaj kutimaj distraĵoj: Akva pafado, Bamba ktp.) Ankaŭ vi povos partopreni en la programo kaj ricevi rabaton! Por fari proponojn pri la arta kaj lingva festivalo: <arts-et-langues@egroups.fr> Por aliaj proponoj: <ijk-organizado@club.voila.fr> Por pliaj informoj kaj por aliĝi dum la unua tarifa periodo (ĝis la 3-a de januaro 2001), vizitu la ttt-ejon:

<http://purl.org/net/ijk2001>

Xavier Godivier

<godivier@netcourrier.com>

--- fonto: ret-info



## REKORDA ALIĜO DE DUMVIVAJ MEMBROJ EN 2000

Granda ondo de dumvivaj membriĝoj en UEA fine de decembro rezultigis, ke en la jaro 2000 UEA ricevis pli da novaj dumvivaj membroj ol en iu ajn jaro de post 1976, kiam la kotizo de dumviva membreco estis fiksita je 25-oblo de la kotizo de Membro-Abonanto. En 2000 UEA ricevis 34 novajn dumvivajn membrojn. La antaŭa rekordo (29) estis de la jaro 1979. Plej multe da novaj dumvivaj membroj venis el Francio kaj Germanio (po 5). Japanio kaj Usono liveris po 4. Brazilo kaj Britio po 3. El Nederlando venis 2 dumvivaj aliĝoj, kaj po 1 el Aŭstralio, Bulgario, Ĉinio, Hispanio, Korea Resp., Luksemburgio, Pollando kaj Vjetnamio. 23 el la aliĝintoj estas viroj, 11 estas virinoj. La plej juna naskiĝis en 1984, la plej aĝa en 1921. Ok novaj dumvivaj membroj antaŭe ne membris en UEA, sed ili rekte aliĝis en la dumviva kategorio. Fine de 2000 UEA nombris entute 899 dumvivajn membrojn.

### • Yumeiho - japana kuracmetodo

Tiun ĉi kuracmetodon mi jam praktikas kvin jarojn kaj unuan jaron kun tria grado. Yumeiho estas koksosto-ĝustiga prem-kneda terapio. Iinter mil homoj oni malfacile trovas eĉ unu kun tute normalaj koksostoj. Preskaŭ ĉiuj homoj havas

koksostojn pli aŭ malpli delokitajn. Pro delokiĝo de la koksostoj la kurbigita spino premas nervojn kaj kaŭzas perturbon de funkcioj de muskoloj, artikoj kaj visceroj. La delokiĝo de koksostoj estas la ĉefa kaŭzo de doloro ĉe koksoj kaj ŝultroj kaj malsano de internaj organoj, kiuj ĉagrenas multajn homojn.

La koksosto-ĝustiga prem-kneda terapio estas kuracmetodo por ĝustigi ostojn de la tuta korpo, malstreĉi ĝiajn muskolojn kaj konektivajn histojn kaj radikale forigi ĝiajn malsanojn, kun koksostoj kiel la centro. La metodo, enpreninte la avantaĝojn de diversaj masaĝoj, reartikigas kaj fiksas la ostojn per tirado, ĝustigo kaj vertikala premo, kaj tiel multe levas la kuracefikon.



\*\*\*

Nunjare mi ankaŭ preparos kurson por komencantoj kaj por dua grado (estas bonvenaj kuracistoj, masaĝ-istoj, precipe samideanoj).

D-ro Masayuki Saionji, aŭtoro de tiu ĉi natura kuracmetodo, volus viziti nian urbon dum sia vojo al Zagrebo je Uko. Tio estos lia unua vizito en Ĉeĥio. En Ĉeĥa Respubliko jam estas kvin Yumei-istoj. Kiu plia volas ricevi diplomon de la aŭtoro de tiu ĉi kurac-metodo?

*Zdeněk Khun  
Sladkovského 103  
508 01 Hořice v Podkrkonoší  
Kun@sendme.cz*

## GRANDA PUBLIKA ATENTO AL LA UK EN KROATIO

La granda atento de kroataj amaskomunikiloj al la 86-a Universala Kongreso en Zagrebo (21-28 julio 2001) montriĝis en la ĉeesto de ok radiostacioj, novajagentejoj kaj gazetoj en la gazetara konferenco pri la UK, okazinta la 15-an de januaro en Hotelo Esplanade. La ĵurnalistoj ricevis freŝajn informojn pri la kongrespreparoj de Konstanta Kongresa Sekretario de UEA Nikola Rašić, la estro de la Gazetara Servo de LKK Judita Rey Hudeček kaj la sekretario de LKK Spomenka Stimec.

La 13-an de januaro la televida elsendo "Bonan matenon!" invitis Judita Rey Hudeček kaj Ankica Jagnjic kun la Esperanto-parolantaj infanoj David Rey Hudeček kaj Tina Tisljar partopreni en rekta elsendo. La esperantistoj gastis en la elsendo lige kun la temo Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001. La 17-an de januaro la Kroata Radio invitis Ankica Jagnjic al speciala programo pri la Jaro de Lingvoj. La gazeto "Fokus" petis aldonan intervjumon en la kongresa oficejo por konatiĝi kun la Libro servo.

La 8-an de januaro reprezentantoj de LKK rendevuis ĉe la vicprezidanto de la Parlamento Zeljka Antunovic kaj en la Ministerio pri klerigo por enkadriĝi al la Eŭropa Jaro de Lingvoj. Ministrino pri turismo sendis salutmesaĝon por la kongresanoj aperontan en la Dua Bulteno de la UK.

## ORATORA KONKURSO POR JUNULARO RELANĈOTA

Dum 25 jaroj unu el la konstantaj programeroj de Universalaj Kongresoj estis la oratora konkurso por junularo. Unuafoje oni eksperimente okazigis ĝin en la UK de 1949. La sperto estis kuraĝiga kaj ekde la sekva jaro ĝi fariĝis konstanta aranĝo, kiu daŭris ĝis la UK en 1974 laŭ regularo redaktita de Prof. Ivo Lapenna. En 1960 prof. Lapenna donacis pokalon, kiun ricevis la gajninto de la unua premio.

Post paso de pliaj 25 jaroj la prezidanto de UEA, Kep Enderby, lanĉis la ideon restarigi la konkurson. Intertempe la Estraro de UEA decidis prove organizi la konkurson en la Zagreba UK. Se la provo estos same kuraĝiga kiel en 1949, la konkurso fariĝos denove konstanta programero de UK-oj. Laŭ la spertoj oni faros eventuale bezonatajn modifojn en la regularo de la konkurso. En Zagrebo validos la malnova regularo, kun la sola escepto, ke la aĝlimo por la konkursantoj estas plialtigita al 30 jaroj konforme al la nuna aĝlimo de TEJO.

En la konkurso estos tri monpremioj, egalaj al tiuj de la Belartaj Konkursoj. Pri aliaj teknikaj detaloj kaj eventuala komuna temo por la paroladoj la Estraro decidis en sia aprila kunsido, kiam ĝi elektos ankaŭ la jurion.

*CO de UEA*

## KORESPONDA SERVO MONDSKALA: 378 PETOJ EN 2000

Unu el la plej gravaj edukaj establoj de la Esperanto-movado, Koresponda Servo Mondskala de UEA, vigle servis la korespondemulojn ankaŭ en 2000, kiam ĝi ricevis entute 378 korespondpetojn el 53 landoj. La nombro da petoj tre varias de jaro al jaro -- ekde 1993 inter 362 kaj 579 -- depende de hazardaj pintoj en unuopaj landoj. En 1999 KSM ricevis 428 petojn.

Same kiel en 1999, plej multe da petoj venis el Francio, nome 80 (96 en 1999 kaj 70 en 1998). La duan lokon okupis Rusio kun 76 petoj. Ĝi ankaŭ estas la lando, kie la nombro stabile kreskis: 38 en 1998 kaj 56 en 1999. La tria granda kliento de KSM estas Brazilo: 54 petoj en 2000, 39 en 1999 kaj 59 en 1998. Tiuj tri landoj senkompare distingiĝas disde ĉiuj aliaj: sur la kvara loko estas Senegalio kun 10 petoj, sekvata de Germanio, Hungario, Irano kaj Kubo kun po 9 petoj.

De 1990 KSM estas prizorgata de s-ro Francois Xavier Gilbert. La adreso de KSM estas: B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio. Informilon kaj aliĝilon oni povas peti kontraŭ unu respondkupono. Por rekte ricevi adresojn de korespondemuloj, oni sendu du respondkuponojn kun detalaj indikoj pri si mem kaj pri la dezirataj korespondantoj. Ret-adreso kaj TTT de KSM:

<ksmesperanto@aol.com>

<http://www.multimania.com/kosomo>

## LITERATURA KONKURSO "EKRA-2001"

Esperantista domo de kulturo "D-ro Ivan Kirchev" en Razgrad (Bulgario), anoncas literaturan konkurson pri poezio kaj humuraĵoj, originale verkitaj en esperanto "EKRA-2001", je libera temo.

La verkoj ne devas esti jam publikigitaj kaj partoprenintaj en aliaj konkursoj. Verkojn por la konkurso, subskribitajn per pseŭdonimo, oni sendu en tri ekzempleroj al la organizantoj (Esperantista domo de kulturo "D-ro Ivan Kirchev", str. "Sv. Kliment" EK-3, BG-7200 Razgrad, Bulgario). La nomo kaj la adreso de la aŭtoro estu en aparta koverto surskribita per la sama pseŭdonimo. La ĵurio kunsidos la 7an de junio 2001.

La premioj estos esperantaj libroj kaj diplomoj. Premiitaj verkoj aperos en revuo "Literatura Foiro" kaj "Esperantista tribuno" (Razgrad). La anonco de la rezultoj kaj la premiado okazos kadre de la esperanta kultura festo "Abritus-2001" en Razgrad, la 8-9an de junio 2000, organizota kunlabore kun LF-koop.

**8. Konference ČES  
se uskuteční ve dnech  
19.-21.10.2001  
v Poděbradech  
v době oslav výročí  
Jiřího z Poděbrad.**

## Julius Zeyer

(1841-1901)

Al komenco de la nuna jaro falas duobla datreveno de unu el plej grandaj klasikaj ĉeĥaj verkistoj kaj poetoj. Kiel filo el riĉa burĝa familio li estis edukata por transpreni la ligno-entreprenon de sia patro, sed lia naturo kondukis lin al studado de filozofio kaj antikva kulturo. Lia deveno estis ĉeĥa-franca-germana kaj tial lin ravis ne nur la ĉeĥa pasinteco, sed ankaŭ la tutmonda historio. Tra-vojaĝinte la tutan Eŭropon kaj kolektinte fortajn impresojn, li dediĉis sin plene al literaturo.

En sia eposa poezio li praktikis liberan senriman version, per kiu li revivigadis antikvajn mitojn kaj legendojn. Troveblas tie motivoj ĉeĥaj (*Vyšehrad, Alveno de Ĉeĥ*), rusaj (*Kanto pri la venĝo de Igor*), irlandaj (*Reveno de Ossian*) kaj francaj (*Kanto pri Rolando*). El ĉeĥa historio ĉerpis liaj dramoj (*Kolero de Libuša, Šárka, Neklan*), sed plej sukcesa estas lia dramigo de slovaka popola fabelo *Raduz kaj Mahulena*, kiun riĉigis per sia muziko komponisto Josef Suk (1874-1935).

La deviga lerneja legado malplaĉigis al mi preskaŭ ĉiujn naciajn klasikulojn kaj nur kiel plenkreskulo mi komencis mal-kovradi ilin kiel aŭtorojn interesajn kaj legindajn. Ĉe Zeyer ravis min precipe liaj historiaj prozaĵoj, kies stilo - kompare kun liaj samtempuloj - ŝajnas al mi surprize moderna kaj freŝa.

Li ĉerpis denove el diversaj kulturoj. Motivoj ĉinaj (*Feliĉo en ĝardeno de*

*florantaj persikujoj*), japanaj (*Gompaĉi kaj Komurasaki*), klasikaj franca legendo (*Romano pri fidela amikeco de Amiso kaj Amilo*) aŭ rusa romano pri Katarina la Granda (*Andreo Ĉerniŝev*). Plej multe impresis min liaj religiaj temoj (*La ĝardeno de Maria, Tri legendoj pri krucifikso*). La laste menciita trio konsistas el legendo Praga (*Inultus*), pri almozulo servanta al skulptistino kiel ideala modelo de sanktulo, legendo Toleda (*El Cristo de la Luz*), en kiu viviĝinta statuo de Kristo malebligas krimon, kaj legendo slovaka (*Samko Birdo*) pri mokata almozulo, kiu per sia kredo hontigas eĉ episkopojn.

Ankaŭ liaj romanoj pri samtempuloj respiegulas romantikan, religian, preskaŭ mistikan etoson. La heroo de romano *Jan Maria Plojhar* forveturas al Italio por resaniĝi de malsanoj korpaj kaj animaj, rekapta lin nova amo, sed ankaŭ mortigas. Ĉeĥa studento de medicino en la romano *Domo ĉe dronanta stelo* vivas en Parizo kaj baraktas inter la klasika kredo kaj modernaj filozofiaj fluoj.

El lia verkaro ne estis esperantigite tre multe. En *Ĉeĥoslovaka Antologio* (1935) aperis fragmento el *Neklan* kaj rakonto *Feliĉo en ĝardeno de florantaj persikujoj*. En *Ĉeský esperantista* 1912 (p. 45) estis publikigita *Hina rakonto* kaj en legolibro *Legu kaj parolu* fragmento el la romano *Jan Maria Plojhar*. Rudolf Hromada esperantigis poemon *Pilgrimo* (Intima Triptiko, 1978, p. 35), pluraj aliaj peco de diversaj tradukantoj restis en manuskriptoj, kies sorto ne estas konata.

Miroslav Malovec

## Ministeria alvoko

Ĉeĥa ministerio por instruado, junul-aro kaj korpeduko publikigis alvokon por lernejoj okaze de la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001. La alvoko substrekas, ke

\* la elekto de fremda lingvo ne estu moti-  
vita nur per ekonomiaj interesoj, sed an-  
kaŭ por ampleksigi kulturajn, profesiajn  
kaj socialajn spertojn

\* ke ankaŭ instruistoj kaj gepatroj de  
lernantoj klopodu lerni lingvojn

\* ke lingvoinstruado servu edukadon al  
toleremo kaj demokratio

\* ke partneraj rilatoj inter lernejoj peru  
ekkonon de aliaj kulturoj kaj vivkondiĉoj

\* ke aŭtoritatuloj pensu pri projektoj, kiuj  
proksimigus diversajn lingvokomunu-  
mojn en la regiono

\* lingva portfolio (atestilo pri personaj  
lingvokapabloj), kiu faciligas moviĝon  
tra Eŭropo, motivigu al studado de  
fremdaj lingvoj.

La alvoko poste prezentas plurajn  
ekzemplojn de aktivecoj. La lernejoj  
povas:

\* en lernejoj gazetoj krei **rubrikojn pri  
lingvoj** (intervjuoj, fremda lingvo kaj mi,  
lingvaj diferencoj, kvizoj ktp.)

\* krei **projekton de minikursoj** de bazaj  
konversaciaj esprimoj de lokaj lingvaj  
komunumoj (murgazetoj, gazetaro,  
tramoj kaj busoj, atendejoj ktp.)

\* krei **lingvan mapon** laŭ lokaj lingvaj  
grupoj, laŭ lingvokapabloj de lernantoj  
k.s.

\* aranĝi **diskutadojn** kun personoj  
sciantaj plurajn lingvojn

\* prepari **lingvajn klubojn** por peda-  
gogoj kaj gepatroj

\* aranĝi fremdlingvajn **teatraĵojn,  
festivalojn, kabaredojn, kvizojn** k.s.

\* organizi **tagojn de unuopaj lingvoj**  
kun prezento de gramatiko, literaturo,  
muziko, arto k.s.

\* prepari **bazajn kursojn pri la ĉeĥa**  
dum internaciaj renkontiĝoj

\* fondi **lingvan informojn** pri kursoj,  
lingvaj ekzamenoj, lerniloj (gazetoj,  
TTT)

\* prepari **lingvan foiron** kun standoj pri  
unuopaj lingvoj kaj iliaj kulturoj  
(enkadre de lernejo, kvartalo, urbo,  
regiono)

\* fondi **lingvajn studejojn** kun  
komputiloj, fremdlingva gazetaro kaj  
literaturo

\* krei **korespondan reton**

\* ligi **kunlaboron** kun lokaj kulturaj  
institucioj

Kelkajn aktivecojn eblas direkti al  
internaciaj eventoj:

\* 18.-20.2.2001 en Svedio okazos  
**Inaŭgura konferenco pri Eŭropa Jaro  
de Lingvoj**

\* 21.2. **Tago de la Gepatra Lingvo**  
(Unesko)

\* dua maja semajno - **Semajno de  
Lingvoedukado de Plenkreskuloj**

\* 26.9. **Tago de Eŭropaj Lingvoj**

La lernejestroj larĝigu la eblojn instrui  
fremdajn lingvojn per interesrondoj,  
kluboj k.s. La instruistoj dum instruado  
emfazu la signifon de lingvo por  
komunikado inter diferencaj kulturoj,  
eduku al toleremo kaj al respekto de  
lingva kultura heredaĵo.

## Nabídka zboží

Libroservo Českého esperantského svazu v Praze pro rok 2001. Zboží uváděné v tomto seznamu si můžete objednat na adrese:

**LIBROSERVO ČES, c/o: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha 5 - Hlubočepy**  
Tel.: 02/581 77 32,

E-mail: [m.pluharova@worldonline.cz](mailto:m.pluharova@worldonline.cz)

Při větších nákupech poskytujeme množstevní slevy takto: při odběru zboží

|            |                    |
|------------|--------------------|
| nejméně za | poskytuje se sleva |
| - 200.- Kč | 10%                |
| - 500.- Kč | 15%                |
| 1 000.- Kč | 20%                |

Výše uváděné slevy poskytujeme jak klubům esperantistů, tak i jednotlivým členům ČES. Tyto slevy **neplatí** pro prodej do **zahraničí** a při prodeji ve **stáncích Libroserva** během sjezdů, konferencí a ostatních setkáních esperantistů.

**Ceny** uváděné v tomto seznamu jsou v **Kč** a neplatí pro prodej do zahraničí!

Při **zásilkové službě** (tj. Posílání zboží poštou) **připočítáváme** k ceně zboží expediční náklady, tj. **poštovné a balné**.

Objednávky vyřizujeme v pořadí, v jakém docházejí, až do vyčerpání zásoby. Ne vždy můžeme zaručit dodatečnou dodávku, zvláště u starších nebo zahraničních vydání.

Platit je možno buď svazovou **poštovní poukázkou A-V** na kterémkoliv poštovním úřadě, nebo **pokladní složenkou** u kterékoliv pobočky Komerční banky. Číslo účtu Českého esperantského svazu je 3330-021, kód banky (KB) je 0100; jako variabilní symbol se uvádí číslo faktury (dodacího listu).

### 1. Učebnice k jazykovým zkouškám

1.04 Chrdlovi: Esperantem za tři měsíce (69,-)

1.05 Cink:

Cvičebnice esperanta pro pokročilé (24,-)

1.06 Vondroušek: Historie a spisovatelé (10,-)

1.07 Vondroušek: Historio kaj biografioj (10,-)

1.09 Kilian: La Mondo Rakontos (LMR) (10,-)

1.10 Kamarýt: Historio de la Esperanto-Movado

en Ĉeĥoslovakio (20,-)

1.16 Malovec: Gramatiko de Esperanto (Dua eldono) (130,-)

### 2. Slovníky

2.01 Kilian: 808 nejužívanějších slovních kmenů v esperantu (8,-)

2.02 Kilian: Esperantsko-český a česko-esperantský slovníček (10,-)

2.03 Hromada: Esperantsko-český a česko-esperantský kapesní slovník (20,-)

2.04 Bří Filipové:

Velký slovník česko-esperantský (70,-)

2.05 Kraft-Malovec:

Slovník esperantsko-český (129,-)

2.06 Kraft: Slovník česko-esperantský (23566 hesel) (188,-)

2.07 Rybář:

Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj (16,-)

2.08 Traxler:

Česko-esperantský právnícký slovník (43,-)

2.09 Traxler:

Esperantsko-český právnícký slovník (49,-)

### 3. Povídky, romány a jiná próza

3.01 Čapek: Milito kontraŭ Salamandroj (95,-)

3.04 Kožík: Lumo en tenebroj. Dolorplena kaj herooa vivo de J.A. Komenský. + El la saĝo de Komenio + Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro (26,-)

3.05 Hašek: Ne nur soldato Švejk (126,-)

3.07 Ehtner: Sep tradukoj (Jirásek, Zeyer, Šrámek, Malřířová, Tilschová, Baar, Vrba) (13,-)

3.10 Bauer: La fenomeno Svislando (35,-)

3.13 Rumler: Abunde kaj redunde (4,-)

3.17 Havel: Aŭdienco (42,-)

3.18 Kafka: Songo kaj aliaj rakontoj (126,-)

3.19 Schnitzler: Songonovelo (126,-)

3.20 Kurisu Kei:

Co mi dala česká literatura (30,-)

3.21 Philippe: Badenlanda Legendaro (126,-)

3.22 Foglar: Knaboj de Kastora Rivero (50,-)

3.23 d'Arboud: La besto de Vakareso (98,-)

3.24 Tvarožek: Šercoj 1 (12,-)

3.25 Tvarožek: Šercoj 2 (12,-)

**3.26+G. Pausewang: La lastaj infanoj de Oldrovalo. Román-fikce o světě po zniĉující světové válce. Vzrušující protiválečná knižka**

*přeložena z němčiny do esperanta J. Giessnerem (57,-)*

**3.27+ Astrid Lindgren: La Fratroj Leonkoro**  
*Pohádka o dobru a zlu, plná poezie. Pohádka, která může něco říci nejen dětem, nýbrž i dospělým. Překlad ze švédštiny K. Rohdin. obrázky I. Wikland. (95,-)*

**4. Básně, sbírky básní**

- 4.01 Urbanová: El subaj fontoj (16,-)
- 4.02 Urbanová: Peza vino / Těžké víno (39,-)
- 4.03 Karen (Kořínek) - Rumler - Urbanová - Vidman: Kvarfolio (4,-)
- 4.05 Kořínek: Elektro el la originalaj kaj tradukitaj poemoj (5,-)
- 4.07 K.H. Mácha (tr. Pumpr): Majo (62,-)
- 4.08 Urban: Nova Ezopo (30,-)
- 4.09 Ludíková:

- Ekaŭdi la animon / Uslyšet duši (96,-)
- 4.10 Gazda: Frenezetajoj (20,-)
- 4.12 Věra Ludíková: Uslyšet duši 1 + 10  
*Báseň "Uslyšet duši" v českém originále spolu s překladem do 10 jazyků: angličtiny, čínštiny, francouzštiny, italštiny, němčiny, polštiny, ruštiny, slovenštiny, španělštiny a esperanta (96,-)*

- 4.13 Věra Ludíková: Uslyšet duši 1 + 16  
*Tatáž báseň se 16 překlady (navíc arabština, ewe, hebrejščina, hindí, holandština, japonština), medailonky překladatelů česky a esperantsky (96,-)*

**5. Zpěvníky**

- 5.01 Cink: Scieta Kantareto (24,-)

**6. Odborná knihovna**

- 6.01 Kolekto de referajoj el internacia seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1982". Energio - tutmonda problemo (10,-)
- 6.02 Kolekto de referajoj el internacia seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1989". fervojoj (45,-)
- 6.03 Werner: Terminologia Kurso (20,-)
- 6.04 Tüma: La fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo ( 9,-)
- 6.05 Seminario pri Komenio. 1992 (13,-)
- 6.06 Maxwell-Preotu-Tacu:  
Lingvo kaj kibernetiko (142,-)
- 6.07 Chrdle (ed.): La Stato kaj Estonteco de la

- Internacia Lingvo (147,-)
- 6.08 Frank: Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion (92,-)
- 6.09 Chrdle: Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj (38,-)
- 6.10 Zosimi Umeda:  
Jak úspěšně vyjednávat s Japonci (30,-)
- 6.11 Vogelmann:  
La Nova Realismo (bindita) (150,-)
- 6.12 Vogelmann:  
La Nova Realismo (broŝurita) (63,-)
- 6.15 Fössmeier:  
Ĉifrado kaj ĝia rolo en la "nova komunikado" - Pri objektiveco en la scienco (30,-)
- 6.16 Kavka: Kontribue al PIV (30,-)
- 6.17 KAEST '98 (Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) - programo (15,-)
- 6.18 Sŭeda: Terminaro de feloj / Názvosloví kůží (126,-)
- 6.19 Frank a spol.: Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko - 6 (880,-)
- 6.20 Frank a spol.: Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko - 7 (880,-)
- 6.21 Weltner a spol.: Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko - 10 (880,-)
- 6.22 KAEST '98: Modernaj rimedoj de komunikado - prelegaro (150,-)
- 6.23 Werner: Matematika vortaro Esperanta-ĉeĥa-germana (20,-)
- 7. Mapy**
- 7.01 Poŝatlaso Praha (25,-)
- 8. Nosiĉe zvukového záznamu**
- KA = mag. kazeta, CD = komp. disk
- 8.01 KA: Team en Esperanto (58,-)
- 8.02 KA: Famaj kantoj por belaj horoj (57,-)
- 8.03 KA: Kantoj de l' popolo (57,-)
- 8.04 CD: Kantoj de l' popolo (115,-)
- 9. Odznaky**
- 9.01 Esperantská hvězdička v bílém kruhovém poli, ø 7 mm (5,-)
- 9.02 Esperantská hvězdička v bílé kruhové výseči, pod ní v oblouku nápis ESPERANTO, 10x17 mm (5,-)
- 9.03 Odznak esperantistů-zdravotníků (5,-)
- 9.04 Odznak Českého esper. svazu (10,-)

## Esperantista balo Česká Třebová

La plej lasta retmesaĝo: Estas ĝuste 21.42 horo la 9-a de februaro 2001. Mi sincere salutas vin el la 31-a Esperanta balo. kiun aranĝas Esperanta rondeto Amikeco en Česká Třebová. Partoprenas ĉirkaŭ 230 gedancantoj kaj 3 muzikistoj. Alvenis ankaŭ gastoj el Nederlando kaj el diversaj lokoj de Ĉeĥa respubliko. Riĉa tombolo enhavas pli ol 280 aĵojn inkluzive de du belegaj grandaj tortoj kaj premion - porkokapon (porko sen korpo). Ĉiuj amuzas sin bone. Ankaŭ vi fartu bele. Elkore salutas vin gepartoprenantoj.

## MOST - unuaj oficialaj TTT en Esperanto

EK Most atingis gravan sukceson: esperantigon de la oficialaj urbaj TTT-paĝoj en la interreto. La paĝojn preparis Jana Žampová kaj esperantigis ilin s-anoj Jiří Rada kaj František Bína. Kiu vizitos la adreson [www.mumost.cz](http://www.mumost.cz), tiu ekvidos unue la ĉeĥajn paĝojn kaj en la supra dekstra angulo simbolojn por la angla, germana kaj Esperanta versioj. Grava inspiro por aliaj urboj.

Ekzemplo de teksto el la TTT de Most:

### ORIENTIGA SISTEMO EN LA URBO

Cxe la vojkrucigxoj en la urbo trovigxas sur mastoj por publika lumigo orientigaj avizotabuloj, jene:

**rugxaj** - stratnomoj

**flavaj** - nomoj de la institucioj, firmaoj kaj establaĵoj

## IOM DA HUMURO

- Sinjoro kelnero, la kotleto estas tro malmola, mi kapablas el ĝi formordi eĉ ne peceton, venigu al mi la ĉefon!  
- Vana klopodo, ankaŭ li ne kapablos.

- Diru al mi, kia estas diferenco inter fulmo kaj elektro?

- La fulmo estas senkosta, dum la elektron necesas pagi.

- Sinjoro kajestro, ĉu la trajno ankoraŭ veturos?

- Sendube, la reloj ĝis nun kuŝas sur sia loko.

Monologo de enamiĝinto:

- Ŝi estis venonta je la tria, nun estas la kvara, mi atendos ĝis la kvina, kaj se ŝi ne venos ĝis la sesa, mi iros je la sepa hejmen.

- Memoru, infanoj, ke pli bone estas disdoni ol ricevi.

- Ankaŭ mia paĉjo tion diras!

- Kaj kio li estas, Joĉjo?

- Boksisto.

- Kia estas la ĉefa parto de ĉevalo?

- La felo!

- Kial vi opinias tiel?

- La felo tenas la tutan ĉevalon kunmetita.

Sensignifa verkisto fanfaronis en societo, ke li naskiĝis en la sama tago, kiam mortis Puŝkin.

- Vere trista tago por la rusa literaturo! rimarkigis unu el la ĉeestantoj.

*Laŭ Marta Lorková*



## Telegrafe el la mondo

■ **Fabelokonkurso** por infanoj A: ĝis 9-jaraj, B: 9-11-jaraj, C: 11-14-jaraj (ne pli ol 3 tajpitaj paĝoj). Ĝis 31.6.2001 akceptas: Paatalo-Instituto, PL 39, FI-93401, Taivalkoski, Finnlando. Oni skribu sur la koverto la vorton "Fabelkonkurso". Ĉiu konkursaĵo estu signita per pseudonimo. En akompana koverto estu la vera nomo, naskiĝdato, adreso kaj, se eble, telefonnumero aŭ retadreso.

■ D-ro Hans Michael Maitzen estis reelektita por dujara periodo kiel **sekretario de la Packomitato de Ne-Registaraj Organizajoj** reprezentataj ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Vieno. En la Packomitato membras 22 NRO-j.

■ Por pli efike kunordigi la agadon de UEA kaj ĝiaj landaj asocioj en la landoj de Meza Eŭropo, la Estraro de UEA nomumis **trimembran regionan komisionon**. Ĝia kunordiganto estas Oszkar Princz, sekretario de Hungaria Esperanto-Asocio. La aliaj membroj estas Stanislaw Mandrak, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, kaj Jan Vajs, prezidanto de Slovakia Esperanta Federacio.

■ E-Klubo ĉe la moskva konstru-instituto MASI iniciatas longdaŭran projekton **Esperanto-kompaktdisko**, kiu estos kompletigata kaj korektata ĉiujare. Nun jam estas kolektita kaj enkomputiligita grandioza materialo (tekstoj, kantoj, ilustraĵoj, fotoj) kaj la

laboro senĉese daŭras. Jen estas provizora enhavo: 0. Lingva problemo en la mondo 1. E-historio 2. E-movado nuntempa 3. E-instruado 5. E-literaturo 6. E-vortaroj. Do, ni petas ĉe aktivuloj dokumentojn kaj ajnajn materialojn (surbendigitajn, enkomputiligatajn) kaj RAJTON uzi ilin. Irina Gončarova, miriĥa@online.ru el [reu-aktivuloj]

## Kelkaj inspiroj por la Eŭropa Jaro de Lingvoj kaj por 100 jaroj de organizita Esperanto en Ĉeĥio (2001 kaj 2002)

\* Proponi al niaj urboj esperantigon de informaj materialoj, paperaj kaj en la interreto (kiel en Most)

\* Proponi esperantigon de materialoj en kasteloj kaj aliaj memorindaĵoj

\* Prepari por la urbaj inform-centroj materialojn pri la loka, landa kaj monda E-movadoj, por ke tiuj povu respondi demandojn de turistoj

\* Proponi materialojn por la komuna kompaktdisko preparata ĉiujare en Moskvo (vidu informon maldekstre)

\* Prepari enciklopedion de nia movado

\* Prepari enciklopediojn de diversaj fakoj en Esperanto (ili estas pli allogaj ol nuraj vortaroj aŭ terminaroj)

\* Prepari informojn pri nia lando, historio, kulturo

\* Tradukadi el la ĉeĥa literaturo

\* Proponi kursojn al lernejoj en interes-rondetoj (por profesia instruado necesas plurjara aproba procedo por ĉiu unuopa fako aŭ lingvo)

### Kvin novaj E-bildkartoj

Ili aperis fine de la jaro 2000:

**Saluton el Znojmo** estas titolo de la unua el ili. kiu aperis okaze de la oktobra asocia konferenco en Znojmo. Ni rememoru la sukcesan konferencon, pri kiu meritis la lokaj klubanoj enkape kun prezidanto Stanislav Bršlica, Věra Šlahařová kaj aliaj, al kiuj ni ŝaldas dankon. La bildkarto enhavas tri bildojn, nome la turon de la urbodomo, preĝejon de sankta Nikolao kaj romanikan rotondon de sankta Katarina. Prezo 4,- Kč.

**Saluton el Ostrava** preparis lokaj samideanoj kun kvin bildoj, nome la pupteatro, la nova urbodomo, historia minejtujo Jindřich, Masaryk-placo kaj monumento Esperanto dediĉita al J. A. Komenský. Prezo 3,- Kč.

**La centjara jubileo de Esperanto-Klubo 1901-2001** en Brunno (Brno) kun bildo de Legoma placo memorigas la fakton, ke en 1901 estis en ĉi tiu urbo fondita "La unua asocio de esperantistoj aŭstriaĵ", kies sekvanto estas la nuna klubo. La formo *Brunno* tirita el latino ebligas formi derivaĵojn (*Brunna*, *Brunnanoj*), dum *Brno* enhavas silabon ekster la sonsistemo de Esperanto (br-) kaj tial ĝi ne taŭgas por plua derivado (cetere estas honoro por ĉiu urbo, se ĝi posedas ankaŭ internacian formon de sia nomo). Prezo 4,- Kč.

**Saluton el Česká Třebová sur du bildkartoj** (aviada rigardo kaj restoriacio "Hory") estas eldonajoj de la Urba Muzeo, kies parto estas dediĉita ankaŭ al Esperanto.



## Esperanto-arbo en Znojmo

Per foto ni revenas al la oktobra konferenco en Znojmo, kie en la ĝardeno de Domo de infanoj kaj junularo estis plantita Esperanto-arbo. La Ekspozicio pri Esperanto en Ŝtata distrikta arkivo daŭros ĝis 30.3.2001.

## 45 jaroj de EK Znojmo

Klubo Esperanto en Znojmo festos en junio 45 jaroj de sia ekzisto. Por LETERVESPERO la klubo petas sendi salutojn en formo de bildkartoj al la adreso Klub Esperanto pri DDM, Znojmo. Sokolská 8, 669 02 Znojmo.

## Internacia ekspozicio

### "De koro al koro".

Mi petas vin partopreni ĝin per sendo de tipa ĉeĥa suveniro al ni. Tiumaniere vi subtenos ne nur la ekspozicion, sed ankaŭ infanan E-klubon, kies gvidanto mi estas.

La 20-an de marto 2001 okazos 10-jara jubileo de mia laborejo - Infana Internacia Centro. Ni organizos internacian ekspozicion "De koro al koro". Bonvenaj estos interesaj leteroj, bildkartoj, kalendaroj, suveniroj, sonkasedoj, kompaktdiskoj (KD), pentraĵoj, desegnaĵoj, memoraĵoj.... Mi estus tre dankema al vi, se vi sendos vian kontribuon al tiu ekspozicio. Mi strebas montri utilecon de Esperanto al publiko de la urbo. Ĉiuj partoprenantoj ricevos memorindajn diplomojn de la Infana Internacia Centro (ja infana Esperanto-klubo estas en tiu strukturo).

*s-ro Valerij Malihin, infana E-klubo  
Infana Internacia Centro  
Dvorec pionerov, str. Konstitucii 1  
Krasnojarsk, 660049, Siberio-Rusio*

## SCI-FI

Al ŝatantoj de scienca fikcio ni rekomendas jenan ret-adreson:

<http://aut.mlboleslav.cz/povidka.html>

*Miroslav Vaněk*

## Esperanto en Lublina Politekniko

estas oficiale instruata kiel dua elektebla lingvo por studentoj studantaj Protekton de Medio. Ĉiujare (ekde 1995) kvarono aŭ triono de studentoj elektas Esperanton kiel duan lingvon. La unua fremdlingvo estas la angla kaj la dua estas elektebla unu el la jenaj kvar lingvoj: la germana, la franca, rusa kaj Esperanto. La studado daŭras du semestrojn kaj enhavas 60 horojn (po 30 en la semestro = 15 semajnoj x 2 horoj). Ĉiujare Esperanton studas 35 personoj. Kutime studadon de Mediprotekto komencas ĉirkaŭ 130 personoj kaj el tiuj 30-40 personoj elektas Esperanton.

## Entreprene uzas Esperanton

En la interreto sub la adreso HYPERLINK <http://www.umco.de> informas ekde novembro 2000 la entrepreno UMCO Umwelt Consult kun la burooj en la germanaj urboj Hamburg kaj Magdeburg apud la germana kaj angla lingvoj nun ankaŭ en ESPERANTO pri iliaj konsil-servoj.

Manfred Trenne

Carlo Sarandrea, Romo

## **Orienta politiko de Vatikano**

*(Publikigita kun permeso de la aŭtoro)*

La 20-a kongreso de la sovetunia komunista partio (1956) kaj la komenco de la t.n. "erao Ĥruščev", la elekto al papo en 1958 de kardinalo Roncalli (kiu konis la orientan situacion, interalie ĉar li regis nunciejon en Bulgario) kaj la Dua Vatikana Koncilio akcelis "malstreĉiĝon" inter la Sankta Seĝo kaj la okcidenta komunista mondo, malfermante samtempe la vojon por la rilatoj kun la orienta komunista mondo.

Pri la malfrostiĝo en la rilatoj inter la katolika Eklezio kaj Sovetunio, oni povas fiksi kiel unuan daton la komencon de la sesdekaj jaroj. La afero tre sensaciis en la roma kurio, kiel atestas la komento, kiun la tiama ŝtatestretario de Papo Johano la 23-a ekkriis al la nuncio elektita por kontakti la sovetunian ambasadoron en Turkio, cele al unuaj paŝoj. La komento estis: "La Papo volas intertrakti kun la ruĝuloj!"

Dum la krizo en Kubo (1962), Johano la 23-a alvokante al la sento de respondeco de la usonaj kaj sovetuniaj estroj, enkondukis humanecan aspekton en konflikto el teruraj perspektivoj: "Ni petegas - skribis Johano la 23-a - ĉiujn regantojn ne resti surdaj je ĉi tiu ekkrio de la humaneco. Ke ili faru ĉion eblan por savi la pacon."

En 1963 la Papo akceptis aŭdienco geedzojn Aĝubei, nome la bofilon kaj filinon de Ĥruščev. La 11-an de aprilo 1963 lia encikliko "Pacem in terris" (por

la unua fojo papa dokumento estis adresita "al ĉiuj bonavolaj homoj") instigis "neniam konfuzi la eraron kaj tiun, kiu eraras" kaj "ne identigi la historiajn movadojn kun la doktrinoj, kiuj estigis ilin". La Dua Vatikana Koncilio (1962-1965) donis la okazon havi iuspecan "provon" inter la katolika Eklezio kaj la komunistaj landoj, kiuj konsideris tiun doktrinan konsultiĝon kun samtempaj skeptikismo kaj intereso. La sovetunia registaro rajtigis la rusan ortodoksan Eklezion sendi delegiton al la Koncilio kaj reprezentanto de Sovetunio (Mcedlov) estis sendita al Romo por spekti la konciliajn laborojn. La popolaj demokratioj laŭ diversaj manieroj konsentis doni pasportojn kaj vizojn por la vojaĝo al Romo de la kunvokitaj episkopoj. La pola registaro montris sin allasema, dum Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio starigis barojn. Tamen la sovetuniaj aŭtoritatoj la 5-an de februaro 1963 liberigis monsinjoron Slipyi, metropoliton de la ukrainoj de Lviv, kiu alvenis al Romo la 9-an de oktobro kaj la 11-an li parolis fronte al la Koncilio dum 20 minutoj, multe pli ol la limo fiksita de la koncilia regularo. La jugoslaviaj aŭtoritatoj en 1963 konsentis, ke kardinalo Seper, ĉefepiskopo de Zagrebo, partoprenu en la Koncilio. La forto de la Koncilio konsistis el tio, ke ĝi donis altestimatan scenejon, kvankam momentan, de libereco de esprimo al konciliaj membroj, kiujn la komunistaj ŝtatoj inspektis kaj kontraŭ kiuj ili ĉiukaze havis rimedojn por reprezalio.

La "ĝisdatigo", anoncita de Johano la

23-a en 1959 kaj plidetaltigita en la postaj jaroj, klare komprenigis, ke la Dua Vatikana Koncilio ne estas koncilio de kondamno. La komunista mondo oficiale konsideris ĉi tiun agadmanieron kiel konfeson de malforteco; sed la Koncilio realigis tre precizan distingon inter ateismo, marksismo kaj komunismo, starigante la problemon de konscienc-libereco kaj de la rilatoj kun la registaraj sistemoj.

Dum la Koncilio mons-ro Agostino Casaroli, tiutempe sekretario de la kongregacio por publikaj aferoj de la Eklezio, vojaĝis al Hungario kaj Ĉeĥoslovakio (en majo 1963), kun la celo studi manieron por solvi la situacion de kardinalo Mindszenty kaj mons-ro Beran. La estonta ŝtatestsekretario de Johano Paŭlo la 2-a tiel startigis la tiel nomatan "politikon de la etaj paŝoj", konsistantan el vojaĝoj sen reeĥo, de interŝanĝo de opinioj sen gazetaraj komunikoj kaj de rimarkoj, kiujn ambaŭ partioj estas vokataj mediti. Ekde tiuj menciitaj (preskaŭ kaŝaj de 1963) la vojaĝoj de mons-ro Casaroli estis multaj: Jugoslavio, Pollando, Moskvo (por la unua fojo en 1971), kaj Kubo (1974). Estas vere, ke la sindevigo de Casaroli estis faciligita de la etoso estigita de la Dua Vatikana Koncilio (kiel ni diris) kaj de la "ekumenaj" kontaktoj akcelataj ĝuste en la direkton de Sovetunio, de la sekretarioj por la unueco de la kristanoj kaj de ĝia sekretario mons-ro Willebrands. Tamen la celo de Casaroli estis ambicia: atingi laŭgradan religian liberecon en Ruslando kaj rekonstruigi de diplomatiaj rilatoj inter Moskvo kaj la

Sankta Seĝo. La fajneco de Casaroli kuŝis en tio, ke li kapablis konfidi (en ĉiuj situacioj, ankaŭ en tiuj malfacilaj, plej rigidaj, ankaŭ en tiuj, kie la homoj estas ene de kiraso de ideologioj kaj antaŭjuĝoj), ke oni povis atingi la korojn de la personoj, ke ĉiu homo je iu punkto povas kompreni. Jen la sekreto de lia dialogo: ĝi estis dialogo, kiu neniam celis ekspluatadon, sed ĝi estis dialogo por atingi la koron de la homoj, de la personoj, ĉu ĉefministroj, ministroj, homoj havantaj instituciajn rolojn, malantaŭ kiuj ŝajnis, ke la persono malaperas. Casaroli neniam iluziigis pri komunismo, tamen li konfidis, ke ene de la institucioj estas la homoj, ke ĉiam estas lumo, kiu prilumas la homon, kiu agas.

Nur post la falego de la Muro de Berlino kaj la restarigo de diplomatiaj rilatoj inter Ruslando kaj Vatikano (1989) eblis konscii pri la graveco de la agado de Casaroli je la servo al la Eklezio, kaj - ne malpli grava - al la homaro.

La celoj de la "politiko de la etaj paŝoj", konforme kun la principoj de Paŭlo la 6-a pri la apostola devo propra al la posteulo de Petro, estis simplaj: la agnosko de la aŭtoritato de la Papo sur la katolikoj de la koncernataj landoj; la restarigo de la katolika hierarkio en la diocezoj, surbaze de la rajto de la Sankta Seĝo nomumi episkopojn; la restarigo de la komunikadoj inter Romo kaj la episkopoj kaj inverse. Ili estis kanonjuraj postuloj (kiuj implicis la akcepton de revivigo de la parohoj, de la seminariejoj,

de la vokiĝoj ktp.), kiuj iris kontraŭflue kompare kun la spirito de la malvarma milito, sed tre kongruis kun la spirito de Helsinki, nome la proklamo de religia libereco por ĉiuj, en kunteksto de eŭropa vidpunkto. Entute la Eklezio agis per senlaciaj intertraktadoj kun la orient-eŭropaj landoj por akiri al si tiun liberec-spacon eblan, nome la nomumon de episkopoj kaj la eblecon, ke al la Eklezio iamaniere oni ebligu konservi netuŝitan ĝian forton proponi, anonci.

Ostpolitik estis ankaŭ politiko de signifa konkurado. La menciita akordo subskribita kun Jugoslavio en 1966 starigis reĝimon de "divido", ĝi ebligis interŝanĝon de reprezentantoj el diplomacia speco aŭguste de 1971, kun antaŭa vizito en Vatikano de marŝalo Tito (29.3.1971). En tiu sama jaro 1971 kardinalo Mindszenty akceptis forlasi la usonan ambasadorejon en Budapeŝto por iri al Vieno kaj esti levita de la funkcioj (5.2.1974). Kelkajn jarojn antaŭe la intertrakto kun Prago (1965) por mons-ro Beran (kreita kardinalo kaj anstataŭigita de mons-ro Tomášek kiel apostola administranto) estis finita per malsukceso. Sed la Sankta Seĝo daŭrigis sian klopodon dialogi kun la aŭtoritatuloj de Prago decembre 1970, marte 1971, novembre 1972, januare 1973, kaj konsekvence, oni povis nomumi du episkopojn kaj du apostolajn administrantojn marte 1973.

La unuan de decembro 1977 (simbole, kiel oni poste konstatis) Paŭlo la 6-a akceptis aŭdienco la unuan sekretarion de la pola unuigita partio, Edward Gierek. La Papo diris, dum sia alparolo,

ke la "katolika Eklezio ne petas privilegiojn, sed nur la rajton esti ĝi mem kaj la eblecon plenumi sen baroj la agadon, kiu estas propra al ĝi pro siaj konsisto kaj misio".

Ni diris, ke la Ostpolitik, konfidita de Paŭlo la 6-a al la zorgoj de mons-ro Casaroli, estigis gravajn fruktojn. Tion Paŭlo la 6-a mem memorigis en sia lasta parolado fronte al la diplomataro akreditita ĉe la Sankta Seĝo (januare 1978): "Dum multaj jaroj, kun la escepto de la kazo de kelkaj landoj, por kiuj tio ne estis al ni permesita," li diris, "la Eklezio klopodis starigi sinceran kaj malfermitan dialogon, kiun oni ne povas konsideri senrezulta, kaj kiun ni deziras pli profunda, plivastigita al punktoj ankoraŭ ne traktitaj."

Johano Paŭlo la 2-a, ekde 1978 ĝis 1985, verŝajne anstataŭigis la "etajn paŝojn" (regulo de sia ŝtatssekretario) per la principo de pli rekta interveno. Certe "perestrojko" malfermegis novajn perspektivojn kaj multe pli faris ankoraŭ la falego de la Berlina Murego en 1989. La orienta politiko tucerte havis sian nemalgrandan rolon en tio. La lastaj du Asembleoj de la Sinodo de la Episkopoj dediĉitaj al Eŭropo deiris ĝuste el tiu evento.

Papo Johano Paŭlo la 2-a en Gniezno (Pollando) diris la 3-an de junio 1997 dum la Sankta Meso por la jarmilo de Sankta Adalberto: "Falis la muro, kiu dividis Eŭropon. 50 jarojn post la komenco de la dua mondmilito ĝiaj efikoj ĉesis fosi la vizaĝon de nia kontinento.

Finiĝis duona jarcento da divido, pro kiu milionoĵ da loĝantoj de centra kaj de orienta Eŭropo pagis teruran koston."

La Eklezio, kiel kongruas kun ĝia religia kaj humaneca misio, kondamnis la teoriojn kaj la ideologiojn, kiuj forigis Dion el la socio kaj kiuj humiligis la homan dignon: Ĝi ĉiam pledis por la respekto de la rajtoj, agnoskitaj internacie kaj subskribitaj de tiuj landoj mem, kiuj male malrespektis ilin. Sed ĉefe - oni povas diri fine de ĉi tiu malgranda noto - la Eklezio amis la loĝantarojn submetitajn je sistemoj, kiuj generis spiritan kaj materian malriĉecon, nekonon pri la religio, mankon de vero.

(Tiu ĉi prelegon por Tago de Prelegoj kaj Diskutoj, okazinta la 20-an de majo 2000 en urbo České Budějovice, kompilis ĝenerala sekretario de IKUE Carlo Sarandrea).

## NI KONDOLENCAS

Mi ricevis el Vatikano de Carlo Sarandrea jenan sciigon:

"Kun profunda persona doloro mi informas, ke dimanĉe 28.1.2001 je la 5-a matene mortis en Fiesole apud Florenco nia kara **Pastro Giacinto Jacobitti**, 97-jara. Mi ĵus ricevis la informon de unu el liaj kunpastroj."

Mi aŭskultis la elsendojn ekde la komenco, kiam en printempo 1973 dimanĉe je 0.30 eksonadis 3-minuta muziko kun kelkaj Esperantaj vortoj.

Miaopinie la iniciatinto de la E-lingva elsendado de la Vatikana Radio meritas mencion en la E-periodikaĵoj.

*Jiří Laube*

## Milada Hemerková forpasis

(\* 15.7. 1925 - † 18.1.2001)

Ni informas ĉiujn konatojn, ke post longa grava malsano mortis elstara esperantistino, multjara prezidantino de E-klubo Dukla Pardubice, organizantino de multaj konataj internaciaj pacrenkontiĝoj en Pardubice, multjara instruistino de Esperanto en diversaj kursoj, ankaŭ skribaj, ankaŭ por infanoj, ankaŭ en SET Lančov, estraranino de MEM, dumviva membrino de ĈEA - nia kara samideanino Milada Hemerková. Ni neniam forgesos ŝian laboremon kaj oferemon por disfloro de E-movado. Honoron al ŝia memoro!

## Jan Blažek kaj Jaroslav Lysý

- la 17.10.2000 mortis Jan Blažek el Strakonice, iama prezidanto de kunfandiĝintaj kluboj Písek-Strakonice kaj instruanto de Esperanto-kursoj  
- en Brno 16.12.2000 tragike forpasis samideano Jaroslav Lysý (nask. 1922)



## Honoraj prezidantoj en Olomouc

Eksterordinara kunveno de la Esperanto-klubo en Olomouc okazinta la 28.11.2000 elektis multjaran funkciulon de la klubo s-anon Ludvík Zaoral honora prezidanto de la klubo pro lia senlaca oferema poresperanta agado.

Ankaŭ estis rememorigita 5-a datreveno de morto de s-ano Ing. František Svoboda kaj por esprimi dankon por ĉio, kion li por Esperanto-movado faris, la kunveno nomis lin honora prezidanto de la klubo "in memoriam."

*D-ro Vladimír Mohapl*

## Aŭtoraj rajtoj de Karolo Piĉ (1920-1995)

En decembro 2000 la rajtoj je ĉiuj verkoj de la konata Esperanto-aŭtoro Karolo Piĉ (1920-1995) kontrakte transiris al Reinhard Haupenthal per interkonsento subskribita de S-ino Věra Onesorková, la vidvino de Karolo Piĉ, kaj Reinhard Haupenthal. La kontrakton preparis germana advokato. Ĝi donas al R. Haupenthal la eblon jure persekuti personojn kaj instituciojn, kiuj lezas la aŭtorajn rajtojn de Karolo Piĉ. Represo el la verkoj de Piĉ (eĉ de unuopaj poemoj) estas ebla nur kun skriba konsento.

Estis la volo de la mortinta aŭtoro, ke liaj verkoj aperu sub la eldon-emblemo Iltis. Pro tio Edition Iltis plu zorgos pri la reeldono de elĉerpitaj verkoj kaj pretigos la eldonon de ankoraŭ manuskriptaj verkoj (ĉirkaŭ dekduo).

La transiro de la aŭtoraj rajtoj efektiviĝis okaze de la 80-jariĝo de Karolo Piĉ, la 6an de decembro 2000.

Kadre de Edition Iltis plu funkcias la Fondajo Karolo Piĉ (FKP). Interesiĝantoj petu prospekton pri FKP ĉe

Edition Iltis  
B.P. 19  
F-84340 Malaucéne  
editioniltis@aol.com  
Tel./Fax: +33  
(0)4.90.65.28.33



## Lernolibro por kuracistoj kaj biologoj propagandas Esperanton

Ĵaŭde vespere, la 1-an de februaro 2001, telefonis al mi magistro Bohumil Bouzek (EK Ústí n. L. kaj EK Prago), ke li estas nun en Brno en la presejo Centa, kie naskiĝas nova lernolibro por studentoj de medicino kaj biologio *Základy buněčné biologie* (Baza ĉela biologio), kiun li (kun amiko) ĉehigis el la angla. Post la libro inter reklamaj aperos ankaŭ du paĝoj pri mondlingvoj en la historio (greka, latina, franca, angla) kaj unu paĝo pri Esperanto. Tiamaniere 20 mil studentoj ricevos informon pri nia movado kun referenco al la interreta adreso [www.espero.cz](http://www.espero.cz). Ĉe tiu adreso aperos ankaŭ fragmentoj de la libro en Esperanto (kun permeso de la usonaj aŭtoroj).

Mi scivoleme alveturis laŭ la invito en la presejon, kie oni montris al mi metal-tabulojn kun presota teksto kaj maŝinojn kun kvar cilindroj por koloraj bildoj. Tie s-ano Bouzek kun presisto ĝuste strebis trafi la kolorojn de bildoj sur unu folio kun ok paĝoj laŭ modelo ricevita el Usono. Multfoje oni provis presi la bildojn, korektis la kolorojn per komputilo, ĝis fine B. Bouzek subskribis la folion, ke nun ĝi estas en ordo. Poste li rakontis al mi, ke li ricevis monon por la libro danke al eksterlandaj esperantistoj, sed ankaŭ danke la fakton, ke jam pluraj fakultatoj kaj librovendejoj antaŭmendis preskaŭ la tutan eldonkvanton. La libro aperos meze de februaro.

Miroslav Malovec



Josef Cink

## Lingvaj ludoj kaj enigmoj

(5)

La alian stokon de enigmoj ni komencos per

### REBUSO

Temas pri tasko diveni el simplaj desegnaĵoj kombinitaj ofte kun literoj kaŝitan vorton aŭ kelkvortan esprimon. Ĉe diveno oni devas laŭvorte priskribi la proponitan tuton. Tiu priskribo alimaniere vorte porciigita donos la divenotan esprimon. La solvon oni povas per sinonimo aŭ difino "suflori" ĉe la propono.

Propono: Priskribo: Solvo:

**A**  
**D**

sur D A **surda**



**OAL**

A post O lo **apostolo**

**L**  **KA**

lo koro ka **loko roka**



Sube estas fama proverbo:

AP  
2000 i  AP R   
AP

du mil i tas'  
tri AP ro fi tas'

**du militas**  
**tria profitas**

Kaj nun tri taskaj rebusoj por solvi

8.  

9. **SE D**

10. (Fadeno bassona)

 **D**   **A**

## Ĉeĥa poŝto denove propagandas Esperanton



rekte ĉe poŝtoficejo STRÁŽNICE, distr. Hodonín, per porokaza esperantlingva afrank-maŝinstampilo dum tagoj 11/12/2000 - 20/07/2001. Je la koncerna klišeto estas dulingva teksto: "Internacia Esperanto-Konferenco Strážnice 14.-20.7.2001 LA ESPERO".

Aŭtoris ĝin jam tradicie Ing. ark. Karel Kuĉa kaj gravuris s-ro Karel Pavlíček. Pluajn informojn petu ĉe adreso: ESPERANTO, poŝtkesto 36, CZ-696 62 Strážnice, Ĉeĥio.

Ekde 02/01/2001 la loka poŝtoficejo en Strážnice uzos ankaŭ E-lingvan Eekoglumarkon okaze de la menciita 14-a IEK.

## KALENDARO 2001

|             |                                                      |
|-------------|------------------------------------------------------|
| 9.2.        | Esperantista balo en Ĉ. Třebová                      |
| 26.2.-2.3.  | Ekspozicio en Vyškov                                 |
| 20.-22.4.   | Hlaváček en Ratíškovice                              |
| 23.-29.4.   | Seminario en Skokovy                                 |
| 12.-19.5.   | IFEF-kongreso en Tábor                               |
| 26.5.       | 100 jaroj de EK Brno                                 |
| 26.5.       | Renkontiĝo en Polička                                |
| 1.-3.6.     | Naturamika renkontiĝo en Plavy                       |
| 8.-10.6.    | Paroliga kurso + ekzamenoj                           |
| 9.6.        | Ĉeĥa-saksa tago en Pirna                             |
| 1.-14.7.    | 1-a etapo de SET Lančov                              |
| 14.-20.7.   | OSIEK-konferenco Strážnice                           |
| 14.-21.7.   | Bus-ekskurso al Zagrebo (IKUE)                       |
| 15.-28.7.   | 2-a etapo de SET Lančov                              |
| 20.-28.7.   | Bus-ekskurso al Zagrebo (AEH)                        |
| 4.-11.8.    | Katolika E-Tendaro Sebranice                         |
| 29.7.-11.8. | 3-a etapo de SET Lančov                              |
| 12.-18.8.   | Ripozsemajno en Lančov                               |
| 2.-5.9.     | Antaŭ-IBIRE en Dobřichovice<br>(por biciklistoj)     |
| 5.-9.9.     | IBIRE en Doksy<br>(Internacia Biciklista Renkontiĝo) |
| 21.-23.9.   | Kultura Festivalo en Ústí n. L.                      |
| 10.-14.10.  | Klerigaj tagoj Jetřichovice                          |
| 19.-21.10.  | 8-a konferenco de ĈEA en<br>Poděbrady                |
| oktobro     | Aŭtuna semajno en Skokovy                            |
| 8.12.       | Ĉeĥa-Saksa tago                                      |
| decembro    | E- Silvestro en Ĉ. Třebová                           |

### Plua E. filatela sukceso

Ĝus nin atingis jena informo: Antaŭ nelonge, fakte pasintjare gastigis hispana ĉefurbo Madrid Tutmondan filatelan ekspozicion ESPAÑA 2000.

Per siaj diversaj eksponaĵoj ĝin partoprenis 645 gefilatelistoj el la tuta mondo, inter kiuj estis eĉ unu el plej sukcesaj Esperanto-filatelaĵ kolektoj tutmonde: "Ĉapiroj el historio de Esperanto" de jam bedaŭrinde forpasinta samideano Vlád'a Váňa el Plzeň, Ĉeĥio.

La menciita eksponaĵo konfirmis sian eminentan nivelon kaj denove gajnis grandan

orumitan medalon, por kio ni elkore gratulas.

V. Hasala, ĉefo de Espo-sekcio de ACP

### Všem esperantským klubům:

Príspevkový řád na rok 2001 se nemění (viz str. 2). Bonus za společnou platbu klubu: **kluby s právní subjektivitou** (tj. mající vlastní účet) si sami sníží poukazovanou částku o 10%. **kluby bez právní subjektivity** poukáží celou částku a bonus jim bude převeden na subkonto svazového účtu, odkud budou moci peníze podle potřeby čerpat. Příspěvky plaťte v kterékoliv pobočce Komerční banky na č. ú. 3330-021/0100 KB Poděbrady, konstantní symbol 379, variabilní symbol 06940. **Nezapomeňte nám současně poslat seznam členů, za které společnou platbu provádíte** (příjmení a jméno, kategorie, výše příspěvku, event. dar svazu). V Komerční bance si u pokladny vyzvednete *Pokladní složenku*, kterou vyplníte podle pokynů na ní uvedených.



### Evidence klubů a sekcí

Protože probíhá období výročních schůzí, žádáme kluby, aby zprávy o činnosti za rok 2000 zaslali pověřenému členu výboru (Zdeněk Heiser, Na nábrežní 45/25, 736 01 Havířov). Podobně sekce by měly svoji činnost v uplynulém roce oznámit pověřenému místopředsedovi svazu (Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice). Nebude na škodu, zašlete-li kopii i redaktorovi Starta.

## • Jak platit svazu

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplníte pokladní složenku (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně EK (sekce železn.) a místo do kolonky - vklad jménem. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo na inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

06940 ČES  
 06941 UEA  
 06942 předplatné Starta bez členství  
 06943 dary ČES  
 50100 sekce mládeže  
 50200 sekce železničářů  
 50400 sekce pedagogická  
 50401 písemný kurs začátečníci  
 50402 písemný kurs pokročilí  
 50403 členství ILEI  
 50500 sekce přátel SAT  
 50600 sekce šachistů  
 50700 sekce sběratelů  
 50800 sekce nevidomých  
 50900 sekce zdravotníků  
 51000 sekce křesť. esp. KELI  
 51100 sekce katol. esp. IKUE

70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

**Výzva:** Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme více než 20 neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

**Důležité sdělení:** vzhledem k výše uvedené změně platby NEBUDE svaz rozesílat složenkou (děkujeme za pochopení).

**Periodikum Českého esperantského svazu (32. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
 Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
 starto@clavis.cz;  
 www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:  
 Pavel Polnický, ČES**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-  
 Asocio (32-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ  
 rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 9 eŭroj  
 (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
 Bosonožská 15, 625 00 Brno,  
 Ĉeĥio, e-mail: starto@clavis.cz;  
 www.clavis.cz/starto  
 Presis: OPATISK Opava**

ISSN 1212-009X

Odesílatel:

**Český esperantský svaz  
PRAHA**

c/o Pavel Polnický  
Lesní 150/VI  
290 01 Poděbrady

**Internet:** [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz)

[www.kuk.cz/cea/](http://www.kuk.cz/cea/)

☆ **STARTO** ☆

